

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Ryszard Rokicki
pretas kunlabori
Zamenhofaj Tagoj en
pluraj landoj
Gajaj novjarfestoj
Reage al la deklaro
pri malabono
La akademio agas
Eldonado 2006
El "Mia jarcento"
(Grass/Kirschstein)
Tri recenzoj de
gravaj tradukoj
Esperanto en muziko
ne nur en Esperantujo
Fotokonkurso



Februaro
2007

№2

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2007. №2 (148)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2007

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj

Perantoj vidu la liston sur la paĝo 23.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 750 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2007, №2 (148).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 23 января 2006 г.

Цена свободная. Тираж: 750 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Du famaj despotoj forpasis en du diversaj partoj de la globo, diversaj longitudaj kaj latitudaj hemisferoj, en landoj kun diversaj kulturaj tradicioj. Ŝajne, Turkmenio preskaŭ unuanime priploris sian grandan patron. Evidente, en Ĉilio oni havis tre kontrastajn reagojn je la morto de la eksdikta-



toro. Kaj kvankam la homaro en la resto de la mondo (almenaŭ per lango de siaj amaskomunikiloj) opinias la unuan multe pli uzurpa kaj aŭtokrata, ĝi estas multe pli elokventa en kondamnoj kontraŭ la dua. La paradokso malaperas, se ni konsideras la influon de azia fatalismo.

La mondo kutimas trankvile spekti eternan klasikan dramon (eĉ se tragedion), kie nenio dependas de la volo de la protagonistoj. La sorto — plej abomena tipo de rutino — fikse determinas ĉiun rolon, — konkorde saltas marionetoj, kaj ĉiu vojo estas certa kiel orbito. Alia estas aventura dramo sur la scenejo, kie polifonio de voloj produktas plej strangajn kaj subitajn derivaĵojn en la ago. Tiel aspektas, ekzemple, la futbalo. Des pli tia estas la socia vivo en la landoj, kies popoloj havas la kutimon sin senti subjekto de sia historio. Ni miras pri bizara harmonio en kiu la patro de la nacio dekoras la supran punkton de la piramido dum la ŝajne — aŭ vere — dankemaj regnantoj pacience grupigas sin sube. Tiu paco apenaŭ provokas indignon, ĝi atestas pri certa interna stabileco, iuspeca fino de la historio. La indignon provokas persono, kiu sin despotigas en fluaĵ kondiĉoj de socia fermentado, — ja en la rekta senco de la vorto nome li estas *uzurpanto*. Ne estas perforto komandi homojn surgeniujn. Tiuj ne bezonas koncentrejojn, nek amasajn ekzekutojn, nek torturojn... Ĉu ili bezonas alian sorton?

La problemo de la kultura diverseco iĝas akra en la lastaj jardekoj, kaj ĝi pensigas pri eventuala principa nekoincido de civilizoj. La moderna okcident-civiliza etiko agnoskas principe la diversecon. Sed ĝis kiu grado eblas tiu agnosko? Kaj kio garantios, ke tro larĝa amplitudo de paso ne disocios ajnan kreaĵon apogon en la agado de okcidentano? Facile aŭ malfacile ni konsentas, ke al la pacienca regnanto plaĉas lia paca stagno, precipe, vidinte, kiajn rezultojn havas mallertaj penoj igi lin alia. En ĉi-lastaj konkreta (ekzemple, Irako) situo ni volonte konsentas pri malutilo de similaj intervenoj. Sed ni rigardu pli ĝenerale kaj demandu: ĉu ni lasas lokon al idealoj de homo, ĉu tiu nocio mem ne iĝis por ni ĥimero, ĉu vere la libero kaj sklaveco egale premas sur la pesilo de nia konscienco?

Denove nevole mi venas al tiu problemo de simplismo — etika, estetika, scienca aŭ praktika. Al ni plaĉas vidi la progreson en akumulo de plezuroj kaj forigo de embarasoj. Ni ĉesas vidi dignon en laboro, precipe — en tiu de la mensa. La naturo de komforto nin klinas teren. Pli kaj plu... kaj iom plu — kaj oni vidos nin sur la genuoj.

Alen Kris

Sur la kovrilpaĝo estas parto de amuziĝantaj partoprenantoj de la kvina Novjara Renkontiĝo de *EsperantoLand* en Trier. (*Fotis Alejandro Pareja*)

Mea culpa...

de Ryszard Rokicki

Kun intereso mi sekvas la diskuton pri PMEG. La redakcio de *La Ondo* certe volis, ke la verkon recenzi ne amatoro, sed profesia fakulo. Kaj ĝi trovis tian — diplomiton de fremdlingva instituto kaj aŭtoron de pluraj esperantlingvaj noveloj, eseoj kaj poeziaĵoj, alte taksitaj i.a. de William Auld mem. Havante kaj profesiecajn lingvistikajn konojn, kaj internacie rekonitan lingvosenton, li ja sendube estas kaj restas fidinda por tiu tasko, eĉ se slavo, por ne diri ruso. (Cetere ankaŭ mi estas slavo.)

Legante, ke li — Alen Kris — “simple malpravas” kaj aplikas en sia recenzo “rabian kaj insultan atakon” aŭ ke en la recenzo okazas “multloke misa” kaj “intence misinforma citado”, mi ne demandas min, kiu pravas, sed: **kial** multaj aŭ eble nur kelkaj tiel (mis)opinias?

Konsiderante la amplekson de PMEG, mi — kvankam informatika diletanto — povas ja facile imagi, kiom da laboro estas investita en ĝin. Ĝia elektronika formo ebligas al ĉiu esperantisto tujan konsultigon, kio en si mem ne estas trotaksebla fenomeno en la Movado. Ankaŭ nediskutebla estas la fakto, ke “ĝi jam elĉerpiĝis kaj ĉe UEA kaj ĉe FEL, nur kelkajn monatojn post la ekvendo”. Kaj malgraŭ tioj mi tamen restos minoritata. **Kial?**

Kialoj estas almenaŭ tri:

1. De verko, kiu havas la titolon *Plena Gramatiko* de ajna lingvo, mi (kaj supozeble ankaŭ la recenzinto) atendas, ke ĝi estu verkita ne nur por personoj, kiuj prezentas sin jene: «“Estinte” pli malpli “angramatikulo”», kiam mi iam ekstudis Esperanton mi bonvenigas la novajn terminojn kiuj ja estas multe pli kompreneblaj ol la terminoj, kiujn oni provis komprenigi al mi en la lernejo», sed ankaŭ por tiuj, kiuj komprenas la bazan lingvopriskriban nocion.

2. La tasko de tiatipa verko estas prezenti la lingvoelementojn, difini la regulojn de ilia interkombiniĝo kaj priskribi ĉi-riktajn lingvajn fenomenojn. Bone estas, se la priskribo de la lingvo kontribuas al nia scio pri ties strukturo kaj funkciado — ĝi tiel estas almenaŭ iom scienca verko. La gramatiko estas nur modelo priskribanta ties funkciadon, kaj kiel ĉiu modelo, ĝi povas esti pli aŭ malpli bona el iuj vidpunktoj. Ofte kriterioj por prijuĝi la lingvo-

modelon estas simpleco de la priskribo, kapablo klarigi la lingvajn fenomenojn, interna kohero kaj aliaj.

3. Vole-nevole, tiatipa verko rolas kiel siaspeca vizitkarto en la medio de sciencistoj kaj universitatoj, el inter kiuj certe kelkaj scipovas almenaŭ legi en Esperanto. Tiun rolon ĝi povas ludi nur laŭ sia aspekto, kaj ne ĉiam ludas laŭ sia enhavo.



Konklude: la diskuto inter la recenzinto de PMEG kaj ĝia aŭtoro kaj lia apogantaro fariĝis akra, ĉar ili reprezentas du malsamajn tavolojn de scioj, bezonoj kaj atendoj. Mi povas bone kompreni la koleron de la recenzinto, kiu sentis sin debila, eble eĉ iom idiota, legante la “facilajn” gramatikaĵojn de BW. Sed eble dank’ al tiaj intelektaj suferoj de la lingvistike motivita recenzinto multaj aliaj legantoj povas trankvile ĝui komfortan etoson de klero kaj edukiteco, eĉ havinte rutinajn lernejaĵojn, pli frue menciitajn, problemojn.

Kadó, kadó, jam temp’ está! (Teoria Esperanto-Gramatiko)

PMEG estis prezentata dum pluraj jaroj en la reto, kaj oni povis kritike diskuti kun la aŭtoro pri la pretigata lingva priskribo. Tamen apenaŭ io tia okazis, kaj nun BW ja prave plendas: “kiam mi petis konsilojn de diversaj specialistoj kaj gramatikistoj, kaj precipe kiam mi publikigis PMEG-on en la Interreto, mi ĝoje konstatis, ke tiu kritiko preskaŭ tute forestis”. Kiu do respondecas pri la fakto, ke PMEG ne estas tia verko, kia mi — kaj eble kelkaj aliaj — dezirus ĝin esti, ke ĝi kaj ĝia aŭtoro ĉiam riskos alfronti akran kritikon, malgraŭ ke ĝi “estas unuavice praktika lernilo, ne teoria verko por lingvistoj”. Certe ne nur la aŭtoro, sed ankaŭ mi. Ekkonsciinte, ke mi neglektis la peton pri konsiloj, mi eksentas

konscienciproĉojn kaj por mildigi ilin deklaras mian pretecon kunhelpi en reverko de la teoria parto de PMEG. Mi proponas trakti Esperanton kvazaŭ oni estus studentaj nek PAGon nek PMEGon: oni disponas nur pri Esperanta tekstaro, kaj analizante ĝin oni priskribu ties strukturon. Ian, eble ne tre lertan provon de tia procedo oni povas trovi en mia artikolo *Leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la Esperantan morfemaron*². Ĉu ĝi estas utila por didaktikaj celoj, mi ne scias, sed ĝi ja certe sistemigas nian scion pri la strukturo de la Esperanta vorto kaj povas helpi solvi la “bros-problemon”.

Alia ekzemplo: apliko de baza lingvistika scio pri la akcento helpas al ni kompreni la akcentadon de Esperantaj plurradikaj formoj. Kaj apliko de simpla logiko povas suflori al ni solvon. Skribante pri kriterioj, laŭ kiuj oni povas distingi inter bona kaj malbona prononcadoj, John Wells skribas: “La unua kriterio, kiun ni povas rimarkigi, estas la praktika. ... Ĝi estas tiu, kiu faciligas interkomunikiĝon per internacia lingvo”.³ Tiujn ĉi vortojn skribis internacie rekonita lingvisto, kaj ili estas kompreneblaj ankaŭ por tiuj, kiuj rezistis en la lernejo kontraŭ ajna gramatika scio. Siatempo, en la aŭgsburga UK, mi havis interesan diskuton kun gekolegoj de unuigo de esperantistaj filologoj pri la far mi priskribita teorio de la akcento en vortkunmetoj⁴. Eble ĝi estus ia pomero?

Finvorte, ni daŭre trovadu inspiron ankaŭ ĉe bonaj aŭtoroj, kies teorioj kaj lingvaĵo restas modelaj de jardekoj. Oni ankaŭ ĝoju kaj atentu pri modernecaj lingvaj novaĵoj, konsciente tamen, ke la novisma hodiaŭo jam morgaŭ povos fariĝi hieraŭo, foje eĉ kaduka. Por eviti baldaŭan forgeson aŭ amaran senton de akra kritiko, oni (t.e. Esperanto-gramatikistoj) ne timu remaĉi la teoriojn de lingva priskribo, da kiuj abundas ekde la komenco de la pasinta jarcento, por poste uzi teoriantingvistikan bazon kaj prave — kaj ĝue — apliki lingvoanalizajn metodojn en sia gramatikista laboro. *Satisfaction guaranteed or your money back!*

1. KaraGu, *Komentoj*. En: <http://lingva.kritiko.com/2006/11/28/la-gramatikaj-terminoj-en-pmeg/>

2. Rokicki R. *Leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la Esperantan morfemaron*. En: *Studoj pri la Internacia Lingvo*, Gent 1987.

3. Wells J. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam, 1978, pĝ. 25–26.

4. Rokicki R. *Vortakcento en Esperanto*. En: *Acta Interlinguistica*, Warszawa 1985.

Kongo: Esperanto kunigu ĉiujn

La distriktestro de Rutshuru, la komandantoj de la lokaj armeo kaj polico, la komandanto de la Armeo de Unuiĝintaj Nacioj en D.R.Kongo, la paroĥestroj de Rutshuru, direktoroj de tri altlernejoj, lernejestroj, instruistoj kaj lernantoj, festis kun lokaj esperantistoj la Zamenhofan Tagon en la hotelo *La Versailles* en Rutshuru (D.R. Kongo).

La memorindan eventon, organizitan de Virunga Esperanto-Klubo, antaŭis futbal-ludo inter la Esperanto-teamo kaj *Bufalo* (teamo de la distrikto Rutshuru). *Bufalo* venkis je tri goloj kontraŭ unu. Post la matĉo en la hotelo daŭris festa programo kun rakonto pri Esperanto, prezentado de la agado de VEK, deklamado, kantado de *La Espero*. La distriktestro salutis en Esperanto kaj poste promesis subteni disvastigon de tiu universala lingvo en la distrikto, kie homoj interbuĉas sin pro etnaj problemoj. Ĉi tie lingvoj dividas homojn; pro tio Esperanto estas bonvena, por kunigi gefilojn de ĉi tiu distrikto.

Emmanuel Muchuti Rafiki

ISTK: Internacie, restoracie...

10–17 dec 2006 okazis en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) en Bydgoszcz Zamenhofaj Tagoj. La semajna programo enhavis ĉefe kursojn pri Esperanto kaj aliaj lingvoj, ankaŭ pri Esperanto-turismo kaj merkata-agado kiujn gvidis fakuloj el diversaj landoj.

Internacia Zamenhofa Vespero okazis 15 dec en restoracio *Shanghai* kun preskaŭ 200 partoprenantoj el kvar kontinentoj. Dum la vespero prezentiĝis kvar artensembloj el polaj urboj. Post regalo per ĉina manĝeto dum la dua parto prezentiĝis gestudentoj de ISTK el Ĉinio, Mongolio, Albanio, Senegalio, Kamerunio, Tanzanio, Zimbabvo kaj Pollando.

ISTK

Katalunio: Foiro de Asocioj

Dum la decembra Foiro de Asocioj de la urbo L'Hospitalet de Llobregat (Katalunio) 16–17 dec membroj de Kataluna Esperanta Fervojista Asocio, propagandis pri la Internacia Lingvo en budo instalita en la Rambla Just Oliveras, la plej granda promenejo de la urbo.

Antaŭ la budo multaj urbanoj interesiĝis pri ĉiuj aferoj de Esperanto kaj pri la elementa kurso, kiu komenciĝos en januaro en nia sidejo.

Martí Guerrero



Tajvano: en lingva universitato

Tajvana Zamenhofa Festo okazis 16 dec en la universitato Wenzao — la sola lingva universitato en Tajvano kun 66 partoprenantoj el Tajvano, Filipinoj, Belgio, Usono kaj Irano. Pli ol duono de ili estis junuloj.

La organizanto de la festo kaj konferenco estis Kaohsiung Esperanto-Centro, kies estro, f-ino Lin Klementina, bone mobilizis la membrojn.

La programo enhavis prelegojn pri Esperanto. Dum paŭzoj oni rigardis librojn kaj aliajn materialojn pri Esperanto, kaj la libro-servo havis rekordan vendon (3600 NTD). Ĉe aparta budo oni povis (re)aliĝi al UEA, aboni al *Formoza Folio* kaj demandi pri Esperanto. Prof. Chang el Mara Universitato montris belajn fotojn pri la tuta mondo.

Ĉiuj partoprenantoj ricevis memortason por trinkaĵoj kun vortoj pri la Zamenhofa Festo.

Reza Kheir-Khah

Vojvodino: pluraj jubileoj

Esperanto-societo en Senta (Vojvodino, Serbio) okazigis 16 dec solenan kunvenon dediĉitan al la Zamenhofa Tago kaj al la kvincentjara datreveno de la proklamo de Senta kiel reĝa urbo. Samtempe oni omaĝis al du gravaj kulturagantoj: okaze de la 180-jara datreveno de la naskiĝo de Jovan Djordjević kaj de la 100-jara datreveno de la forpaso de Stevan Sremac.

Por tiu okazo estis presita broŝuro. Ludoviko Sekereš, kiu tradukis kelkajn tekstojn en la broŝuro, prelegis pri la jubileantoj. La kunveno finiĝis per ronda tablo “Kiel utiligi parton de heredaĵo de Tibor Sekelj en turismo de Senta”.

Inter la 50 ĉeestantoj estis la edzino de Tibor Sekelj, Erĵebet Sekelj, kaj kelkaj esperantistoj el Niš, Novi Sad kaj Subotica. Post la kunveno estis vizito al zoo kaj bonetosa tagmanĝo.

Boriša Milićević

Zamenhofa Festo en Tajvano: Klementina kaj Reza.

Ĉinio: Te-kunsido de LEA

17 dec 2006 LEA (Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, Ĉinio) aranĝis en la urbo Dandong te-kunsidon okaze de la 147a naskiĝdato de Zamenhof kaj alveno de la jaro 2007. Oni preparolis la pasint-jaran laboron kaj la estontecon de LEA.

Unue, lokaj Esperanto-organizaĵoj havas bonajn gvidantojn kaj estrarojn kun kapablo, iniciatemo, harmonio kaj solidareco.

Due, la organizaĵoj plifortigu kunlaboron kun la koncernaj instancoj por ludi la rolon de funkcioj de la registaroj en disvastigo kaj apliko de Esperanto.

Trie, la persisto de LEA en Esperanto-instruado en altlernejoj estis sukcesa sperto, kiu rapide disvastigas Esperanton en Liaoning.

Kvare, oni konsciis, ke Esperanto estas efika kaj facila ilo por lernado de aliaj fremdaj lingvoj kaj al interŝanĝo de kulturo. Chu Mingyu, prezidanto de la Dandong-a Federacio de Socisciencaj Asocioj, ĉeestis la kunsidon kaj faris varman paroladon.

Fine, Liu Zhengkun, prezidanto de LEA, esprimis sinceran dankon al esperantistoj de la provinco kaj al lokaj instancoj pro ilia subtenado al LEA. Li bondeziris al ĉiu partopreninto sanon kaj feliĉon por Novjaro 2007.

Wu Guojiang

Bosnio: Tago de Kulturo

E-societo *La Mondo* en Banjaluko je la Zamenhofa Tago organizis Tagon de Esperanto-kulturo.

En la urba gimnazio Radojica Petrović, prezidanto de ILEI, prelegis pri modernaj tendencoj en instruado de lingvoj kaj kultura edukado. Lernantoj kaj instruistoj de la gimnazio, en kiu funkcias kurso de Esperanto, poste aktive diskutis.

En la centro *BeL@Espero* prof. Petrović parolis pri Esperanto en la hodiaŭa mondo. Aparte interesa por ĉiuj estis lia prelego pri Armenio kaj liaj impresoj pri tiu malmulte konata lando.

Pri la Tago informis la plej legata gazeto en Respubliko Srpska *Glas Srpske*, serba gazetara agentejo SRNA kaj *Uno Radio*.

Mico Vrhovac





Agi kaj festi

Post sukcesoj en Zakopane, la organizantoj (*Varsovia Vento* kaj PEJ) de Ago-Semajno translokis ĝin al nova loko, kiu tamen estas sufiĉe proksima — Nowy Sącz. Malgraŭ tio, ke la nova loko estas malpli konata, la nombro de partoprenantoj preskaŭ atingis 200. Ili venis el 24 landoj, plej multaj el Ukrainio, Ruslando, Pollando kaj Italio.

La programo komenciĝis 27 dec per interkona vespero. Sekvatage oni multe amuziĝis en pola nacia vespero. Dum aliaj tagoj okazis koncertoj de Kim Henriksen kaj pola grupo *East End*, ekskurso en Sary Sącz, Krynica Zdrój kun vizito de abelbredejo, vizito de gastejo kun promeno sur ĉevalĉaroj, popolaj dancoj kaj kantoj. Ankaŭ okazis multaj prezentadoj, prelegoj, kursoj, ludoj, ktp.

Verŝajne, la plej gravaj programejoj estis Kultur-Lingva Festivalo kaj Novjara balo. La festivalo montris al vasta publiko diversecon de kulturoj kaj lingvoj, kiujn prezentis esperantistoj. En la unua parto diverslandaj partoprenantoj salutis la publikon en sia lingvo, kaj en la dua parto oni povis aŭskulti internacian koncerton. La lasta tago de la jaro 2006 estis dediĉita al preparado, kaj vespere komenciĝis novjara balo. Pro tio ke partoprenis homoj de diversaj landoj, la festo komenciĝis kelkfoje de la jarkomenco laŭ la Moskva tempo ĝis tiu laŭ la Brazila. Agrabla surprizo atendis tiujn, kiuj povis ellitiĝi la unuan de januaro: vizito de gastejo. Varmigita vino forigis ĉiujn restaĵojn de dormo kaj malbona humoro. Post tio eĉ promonado en ĉevalĉaro sub pluvo estis amuza.

Se vi ankoraŭ ne partoprenis ASon, nepre vizitu ĝin por ĝui neforgeseblan junularan etoson kaj festi Novjaron.

Aleksej Korĵenkov

La 23a Internacia Festivalo: ĉiam tradicia, ĉiam speciala

Tradicia kaj samtempe ĉiam speciala Internacia Festivalo ĉi-jare okazis en Germanio, en la urbo Saarbrücken. Al la Festivalo aliĝis 156 esperantistoj el 20 landoj. Ili pasigis la semajnon inter 27 dec kaj 3 jan, ĝuante bonan etoson, amikan rondon kaj riĉan programon. La temo de la festivalo estis “Francio”; kaj laŭ la temo estis multaj programeroj: forumo, kvizo, prelegoj pri kasteloj de Francio, pri la alzaca lingvo, pri la franca literaturo, okazis fromaĝa seminario k.t.p.

Kiel ĉiam, la programo estis riĉa. Diverstemajn prelegon prezentis konataj esperantistoj de diversaj landoj. Oni povis lerni en seminarioj pentradon, magion, kuiradon. Partoprenantoj povis ekzerci jogon, “tai-chi-chuan” kaj malstreĉigan gimnastikon, ludi tabloludojn, ĉeesti te-trinkadon laŭ la rusa maniero kaj spertiĝi en Sudoku.

La kultura programo estis aparte alloga. Siajn koncertojn prezentis Mikaelo Bronŝtejn, JoMo, kaj la grupo *Esperanto-Desperado*. Ravis magia vespero de fama Trixini, interesis kvizo pri Francio kaj plezurigis internacia vespero dum kiu ĉiujn plej amuzis 16-kapa kantgrupo de barbuloj el IF.

Ankaŭ tradicie la 30a de decembro estis dediĉita al ekskurso. Ĉi-foje la vojo gvidis al la franca urbo Strasburgo. Bela vetero kaj sperta ĉiĉerono ebligis al esperantistoj konatiĝi kun bela urbo, manĝi en tipa restoracio, kune promeni kaj kunbabili.

La Silvestra vespero ĉiam estas la

kulmino de IF, kaj ĝi estas gaja vespero por bone manĝi, multe danci kaj bone amuziĝi. Oni devis kelkfoje festi la alvenon de Nova Jaro, ĉar unue venas tiu en Ruslando, poste sekvas Israela-latva-litova-bulgara kaj nur tiam la loka kaj “ĝenerala”. Neniu plendas pri tiom multaj jarŝanĝoj, ja por ĉiuj estas bona okazo por eldiri bondezirojn kaj doni kisetojn. Bela tradicio jam dum kelkaj jaroj iĝas malfermi dancadon per polonezo kaj mazurko. Kiam paroj antaŭ la balo provdancas tio estas bona okazo por multe ridi kaj petoli.

La lan de januaro ankaŭ estas tradicio unue longe kunmanĝi kombinante matenmanĝon kun tagmanĝo (brunĉi) kaj poste iri al novjara promeno tra iu bela loko. Ĉi-foje tio estis agrabla promeno al natura parko, kie eblis vidi ankaŭ baritajn sovaĝajn bestojn. Post tia promenado kafo en Knajpo ege gustas, kaj la etoso en Knajpo ĉiam estas bona: kaj tage kaj nokte... Tie eblas trinketi, agrable babilu, ludi tabloludojn, komputilumi, propagandi, rememori kaj plani esperantajn renkontiĝojn.

IF estas belega ebleco por esperantistoj de multaj landoj agrable transiri al Nova Jaro en internacia etoso; kaj sperta organizanto de tiu festivalo Hans-Deter Platz (HDP) kun siaj helpantoj faras ĉion, ke la semajno iĝu ne forgesebla. Aliĝu frue kaj vi ĝuos rabatkuponojn en Knajpo kaj havos belajn travivaĵojn post unu jaro.

Graĵina Opulskienė

Germana magiisto Trixini en IF (Fotis Remy Bouchet)



Por infanoj, familioj, unuopuloj

Entute 174 homoj partoprenis en la 5a Novjara Renkontiĝo (NR) de EsperantoLand en la germana urbo Trier por festi la novan jaron en internacia rondo. Ĉi-foje ĝi estis tre internacia, ĉar la plej granda grupo, loĝanta en Germanio, konsistis el 44 personoj aŭ nur kvarono de la tuta partoprenantaro. El Francio, Belgio kaj Nederlando venis po ĉ. tridek homoj, kaj entute la gastoj venis el 14 landoj.

Por la sesdeko da infanoj diversaj estis ampleksa programo sub la sperta gvido de Christoph Frank. Okazis diversaj laborgrupoj por produkti ludilojn, muzikilojn kaj aliajn objektojn el rubaĵo — ja la kadra temo de la kunveno estis la medio. Krome eblis partopreni en infana teatro kaj spekti puĉteatraĵon de Christoph Frank, *Bello kaj Bella*, kun iom da magiaĵo. Dum la “ŝtonfesto” infanoj kaj ludemaj plenkreskuloj devis plenumi diversajn taskojn kun ŝtonoj — ĵeti menhiron aŭ taksi la kvanton da ŝtonoj en botelo.

Sed por ĉirkaŭ 50 plenkreskuloj, kiuj ne havis infanojn (kaj eĉ por la gepatroj), eblis sekvi prelegojn pri la biologia diverseco, pri bicikla trafiko aŭ pri la klimatsanĝiĝo. Oni povis ekzemple konatiĝi kun Moskvo kaj kun Hamburgo, kun Linukso kaj kun la komunikaj konsiloj de Rosenberg, kun la franca romano *Les bienveillantes* kaj kun Sorobano. Estis kurso pri ventrodanco de Yasmin, pri societaj dancoj de Bart kaj rondo de jogopraktikantoj.

Gunter Neue kaj Svetlana Smetanina zorgis pri komencantoj kaj progresantoj en diversaj kursoj. Iwona Kocięba prezentis por instruantoj la

retpaĝaron “*edukado.net*”, la instru-filmon *Pasporto al la tuta mondo* kaj manlibron pri instruado.

Vespere okazis du koncertoj. La naŭpersona nederlanda koruso *Akordo*, kantis seninstrumente repertuaron de la 15a ĝis la 20a jarcento. Ĵomart kaj Nataŝa kun sia filino Karina prezentis siajn kantojn, inter kiuj tute freŝa kanto pri la aranĝo mem, pri “NR”. La silvestra festo elstaris per bongusta bufedo kaj per diskoteko, kiun lerte aranĝis Dirk De Weerdt tiel entuziasmigante la dancemulojn ĝis tre malfrua nokto. Krome okazis danca, muzika, luda, vingustuma kaj internacia vesperoj.

La tuttaga ekskurso kondukis per trajnvojaĝo al Luksemburgio, kie István Ertl gvidis nin sprite kaj scio-plene. Ĉe promeno en Trier necesis distingi verajn kaj falsajn klarigojn pri la urbo.

Kiel kutime eble la plej grava loko de la renkontiĝo estis la komuna kafejo, kie oni kunvenis dumtage kaj vespere por babili kaj trinki ion.

La granda renkontiĝo ebligis sukcesan gazetaran laboron. Raportis pri la 5a NR kaj pri Esperanto la germana novajagentejo dpa, pluraj gazetoj, kelkaj radiostacioj kaj la televido de la regiono Rejnlando-Palatinato.

Lu Wunsch-Rolshoven

Projektoj por Afriko en 2007

Kvar projektoj estas plenumotaj en Afriko fare de la Esperanta Civito, jen rekte jen subsidue al paktintaj establoj, dum la nova jaro 2007.

La unua estas la informa bulteno *Afrikume*, produktata de LF-koop, laŭ komisiono de KCE, kiel suplemento al

Heroldo de Esperanto du fojojn jare: en januaro kaj julio. La redaktoro estas c-ano Adjévi Adjé en Lomeo. Eĉ se malofta kaj nur kvarpaga (formato A4) *Afrikume* estas tamen la sola riĉe ilustrita gazeto pri la afrika Esperantio, redaktata de afrikanoj por informi eŭropanojn.

La dua estas la partopreno de oficiala delegacio de la Esperanta Civito en la Monda Socia Forumo en Najrobo fine de januaro: ĝi konsistos el sen. Dieter Rooke, Vickonsulo pri socialaj aferoj, kaj c-ino Etel Zavadlav. Ne estas ankoraŭ certe, ĉu tria persono partoprenos en la delegacio.

La tria estas la organizo de seminario pri la esperanto-literaturo en Dakaro komence de julio, fare de Esperanta PEN-Centro, en kunlaboro kun lokaj esperantistoj. Krom senegalianoj, la seminarion partoprenos gec-anoj Gbeglo Koffi, Chamberline Nguefack kaj Prince Henry Oguinye, plus esperanto-verkistoj en Eŭropo. La seminario enfokusigos la futuron de la esperanto-literaturo en Afriko: kia strategio por transnacia “négritude” en lingvo nek etna nek kolonia? Krome la seminario okupiĝos pri disvolvo de la afrika sociokultura elemento en la konotacio de nia literatura lingvo.

La kvara projekto estas la Afrika Esperantologia Semajno en Buĵumburo, kiun gvidos c-ano Giorgio Silber fine de decembro / komence de januaro. La dua AfrES paŭzas la enhavon de la unua, tial ke ĝi celas la formadon de esperantologoj precipe el Burundio, Kongolando, Ruando, Tanzanio, kiuj ne sukcesis partopreni la unuan AfrES.

HeKo

Dibenitan Kristnaskon!

Ĉi-foje post sia kristnaska mesaĝo la Papo, Benedikto la 16a, eldiris siajn bondezirojn en 64 lingvoj. Post tiu en 2004, ripetigis papa bondeziro en Esperanto okaze de Kristnasko: “Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron!” Samkiel dum la antaŭaj benoj Urbi et Orbi, Kristnaske kaj Paske, ankaŭ ĉi-foje grupo de esperantistoj ĉeestis en placo Sankta Petro por levi alte la panelojn kiuj konsistigis la vorton “Esperanto”. La iniciato estis gvidata, kiel tradicie, de la itala samideano Giovanni Conti. La skribon “Esperanto” oni povis vidi trifoje dum la televida elsendo.

IKUE

Esperanto denove videblis je Kristnasko (Aliaj fotoj aperas je: www.ikue.org).



Sukceso en Brno, ĉu la lasta?

En la Pedagogia fakultato de la Universitato Masaryk en Brno, Ĉeĥio, antaŭ Kristnasko 59 gestudentoj finis per studkontrolo studobjekton *Esperanto 1* (kurson por komencantoj). Ili lernis laŭ kurso *Mazi en Gondolando* tri horojn semajne en du grupoj. Por ĉiu semajno ili ricevis hejmtaskon — konversacian temon, kiu parte rilatis al la lernata leciono.

Por studkontrolo ili ricevis taskon prepari mallongan rakontadon “Vidindaĵoj kaj memorindaĵoj de via loĝloko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Estu ĉiĉerono por via eksterlanda gasto”. Dum la studkontrolo ili plenumis interaktivan teston el Edukado.net *Mia amiko lernas*.

Dudeko el ili jam registriĝis por daŭriga kurso *Esperanto 2* dum prin-tempa semestro.

Sed eble ĉi tiu sukceso estos la lasta, ĉar en la venonta lernoĵaro estos Esperanto forstrekita el la studprogramo de fakultato.

Problemo estas en tio, ke ne estas katedro, kiu povus transpreni garantion super la studobjektoj. Ĝis nun la garantio havis provizore Katedro de sociala pedagogio, sed nun ĝia ĉefo ne plu volas daŭrigi. Li eĉ decidis nuligi la studobjekton *Esperanto 3* — dumferia konversacia kurso en Somera Esperanta Tendaro ĉe Lančov en suda Moravio. Dezirantaj studentoj ja povos partopreni ĝin, sed ili ne ricevos kreditojn. Al iu ajn lingva katedro ne eblas aldoni Esperanton. La plej taŭga ĝi povus esti sub la universitata Centro de Lingva Instruado, sed tie oni instruas nur “grandajn lingvojn”. En la Filozofia fakultato estas instruataj ankaŭ minoritataj lingvoj, sed Esperanton ili ne volas aldoni.

En aŭtuna semestro mi instruas en Esperanto studobjekton *Klerigkibernetiko* por tiuj, kiuj trapasis E1 kaj E2. Mi provos aldonigi por printempa semestro studobjekton *Klerigkibernetiko 1*, kiu estus lingva preparo por *Klerigkibernetiko*, parte ĝi anstataŭus kursojn E1 kaj E2. Sed mi ne certas, ke mi sukcesos, kio estos pli malfacila dank’ al tio, ke mi nunjare pensiĝis kaj mi estos nur kiel ekstera instruisto.

Eble povus helpi laŭdleteroj de sukcesaj Esperanto-kursoj el diversaj landoj senditaj al la rektoro de la universitato, skribitaj en “grandaj lingvoj” aŭ eble dulingve, ankaŭ en Esperanto.

Pliaj informoj ĉe: vojacekjosef@upcmail.cz

Josef Vojáček

Amasa instruado en Hanojo

13 jan 2007 unuafoje malfermiĝis Esperanto-kurso por komencantoj en la Fremdlingva Universitato — Hanoja Ŝtata Universitato. En tiu Fremdlingva Universitato okazos fine de julio 2007 la 63a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (IJK-63). 400 studentoj registriĝis, preterpasante la planitan nombron de 150. Laŭ la Zagreba metodo instruos Nguyen Thi Ngoc Lan, Luong Ngoc Bao, Lai Thi Hai Ly, Nguyen Van Ha, Thieu Quang Dieu kaj Nguyen Xuan Thu. La kurso daŭros tri monatojn. Dek studentoj, kiuj havos plej altajn poentojn en ekzameno, estos rekompencitaj per senpaga aliĝo al IJK-63.

La direktoro de tiu Universitato estas profesoro Nguyen Van Loi, kiu samtempe estas prezidanto de la Vjetnama Esperanto-Asocio VEA.

La kurso estas organizita rezulte de kunlaboro inter VEA kaj la loka Universitata Junulara Organizo.

Nguyen Thu

Bonan matenon, Esperanto!

La informa programo pri Esperanto en TV-elsendo *Bonan matenon, Kroatio* (LOdE-147, pĝ. 9) daŭris de lundo (8 jan) ĝis vendredo (12 jan) ĉiumatene, kun meza daŭro de tri minutoj. Enkonduke TV elsendis 5 jan 2007 informan programon pri Esperanto kaj fine TV-teamo vizitis la lernantajn klasojn kaj filmis interparolojn kun la gelnantoj, kio rezultis per la aldona elsendo 15 jan. Dum la semajnfino 6–7 jan oni plurfoje reklamis la kurson.

Rezulte ni havas en Zagrebo kurson kun deko da plenkreskuloj kaj kurson kun deko da gejunuloj. Dum la elsendo anoncistoj donacis plurajn Esperanto-lernilojn al telefonintoj, kaj Kroata Esperanto-Ligo (KEL) distribuis dudekon da libroj al personoj telefonintaj al oficejo de KEL.

Dezirantoj lerni anonciĝis en Osijek, kie oni preparas novan kurson, kaj en tri vilaĝoj. Al interesitoj en Dubrovnik kaj Vela Luka, kie mankas kluboj, ni sendis lernolibrojn. Iu telefonis el Aŭstrio kaj mendis lernolibron.

Por la lasta elsendo Esperanto-Societo el Rijeka donacis vojaĝbileton al kaj restadon en Rijeka okaze de maja Scikonkurso pri Esperanto por lernantoj. Pluraj telefonintoj klopodis gajni, sed sukcesis la 12-jara knabo Filip Taradi.

Spomenka Štimec



Umberto Eco – nia kandidato

Umberto Eco, la aŭtoro de la fama romano *La nomo de la rozo* per la interlingvistika ĉefverko *La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa civilizo* atestis sian subtenon al esperanto.

La granda semiologo proksimiĝis al nia lingvo fine de la 1980aj, tra la studo de unu el siaj disĉiploj, d-ro Pelerey. Li poste disvolvis la temaron ĝis la menciita verko. Certe altiris lian atenton la centjara jubileo de esperanto, kun sukcesa kongreso en Bolonjo, en kies universitato li estis profesoro.

Umberto Eco estas ne nur elstara sciencisto, sed ankaŭ eminenta ficcia prozisto, kiu kapablis retrovigi al la publiko (ne nur itala: liaj romanoj estis tradukitaj al pli ol dudek lingvoj) la guston pri stilo dokta kaj eleganta samtempe, en kiu li involvis intrigojn inter filozofio, historio kaj nigra literaturo.

Pro la supraj konsideroj, kaj pro lia simpatio ankaŭ al niaj lingvo kaj literaturo, la Esperanta PEN-Centro decidis kandidatigi lin por la Nobel-premio pri literaturo.

HeKo

Genealogio kaj Esperanto

Dank’ al la reto en Pollando vige disvolviĝas geneologia esplorado. Fondiĝis Pola Geneologia Societo kaj 14 regionaj geneologiaj societoj. Ĉirkaŭ mil polaj familioj posedas familiajn retejojn.

En la retejo de la Pola Geneologia Societo estas dekelkaj retejoj kun esperantlingva versio. Vizitu <http://www.genealodzy.pl/toplista.phtml> kaj musklaku reklametojn kun Esperantaj vortoj: tiel vi montros al aliaj genealogoj, ke esperantlingva versio pligrandigas popularecon de la retejo. Ni uzu la okazon por popularigi la internacian lingvon.

Estraro de la Geneologia Societo *Worsten*



Nova sekretario en Litovio

Al la anonco pri konkurso por la laborposteno de sekretario de Litova Esperanto-Asocio, publikigita 2 nov 2006, ĝis la limdato (15 dec) reagis du kandidatoj: Vilmante Kirvelaitė kaj Jūratė Pupštaitė.

Jūratė Pupštaitė (vd. la foton supre), naskiĝinta en 1974, havanta superan neuniversitatan kleron, prezidanto de Esperanto-klubo *Ruto* en Šiauliai, gajnis la konkurson. Sekve, ekde 2 jan 2007 ŝi oficas kiel sekretario de LitEA en Kaŭno, strato Zamenhof 5.

LitEA dankas al Aida Čižikaitė pro ŝia pli ol kvin-jara sekretaria laboro kaj deziras al ŝi sukcesojn en aliaj agadoj.

Povilas Jegorovas

Urugvajo: somera kurso januara

Ekde la lastaj monatoj de 2004 Urugvaja Esperanto Societo (UES) ne havis sidejon, do la aktivado ne estis tiel bona kiel ni volus. Bonŝance, ekde decembro 2006 UES havas denove propran sidejon en Montevideo. La 15an de decembro, je la Zamenhofa Tago, UES inaŭguris la novan sidejon per kunsido kun ĉeesto de membroj de la societo, geekslernantoj, interesitoj kaj lernontoj.

Tuj rekomenciĝis la agado de UES, kaj 11 jan 2007 komenciĝis somera kurso de Esperanto por komencantoj. La kurso estas unumonata, kun du lecionoj ĉiusemajne. La kosto de la kurso estas 180 pesoj, kun la celo plibonigi la sidejon kaj aĉeti/ripari meblaron.

UES ĉi-jare planas fari tutjarajn kursojn ekde aprilo kaj ordigi bibliotekon por ekkomenci pruntedoni la kolekton de libroj, revuoj, diskoj kaj sonbendoj de la societo.

Daniel Bebelacqua

Esperanto-Gården

Esperanto-Gastejo 60° Norde, en provinco Vermlando meze inter Stokholmo kaj Oslo, invitas al kursoj kaj kunvenoj 2007.

Post *Jula kaj Novjara Festo*, februara novaĵo estas *Vigla Vintro* — tri semajnoj familiaj ekde 11 feb. Skiadu arbore kaj deklive (lifto 90 metrojn alta), sketu sur lagoj aŭ skulptu neĝon en nia arta konkurso. Senpaga semajno por via familio, se vi pretas instrui skandinavojn pri Esperanto. Ni havas kelkajn skiojn kaj aliajn vintraĵojn por pruntedoni.

Nova estas ankaŭ *Printempo de Veteranoj* 4–9 mar, celanta pli maljunajn esperantistojn, kies movadaj memoroj kaj spertoj estas dokumentigindaj. Venu al agrabla rakontado, registrita de popolaltlernejoj, dum neĝo degeblas kaj arbore amorfrenezas urogaloj.

Niaj tradiciaj *Someraj Kursoj* okazos 24–30 jun, tuj post somermeza festo. Malnovaj amikoj kaj novaj studos diversnivele, infanoj kiuj ĉiujare venas lernos kaj ludos, helajn vesperojn plenigos muziko kaj danco, kaj ni ekskursos al vidindaĵo kaj banstrando. Krom la lingvaj kursojn, ni organizos en 2007 esperantologian seminarion. Ricevu rabaton se vi venas kun infano(j). Ankaŭ tendumi eblos.

EG estas kursejo kaj migrantohejmo ĉe Sveda Turisma Federacio, internacia kooperativo kiu funkcias per senpaga laboro de membroj-esperantistoj. Ĝi situas en Lesjöfors en arbara distrikto kun multaj montetoj, lagoj kaj alkoj.

EG kun siaj pli ol 80 litoj membras en internacia ĉeno da junularaj gastejoj. Krom du kuirejoj por memzorgantoj troveblas manĝejo *Bon' Appetito*, kiu kuiras kaj svedajn tradiciajn kaj vegetarajn pladojn, eĉ veganajn. EG ofertas ankaŭ tendumejon, saŭnon kaj konsiderindan Esperanto-bibliotekon.

EG estas malferma dum ĉiuj sezonoj. Do eblas private veni iam ajn. Iom sude de Lesjöfors estas mineja vilaĝo Långban, tutmonde plej mineralriĉa loko. En Svedujo eblas libere pluki sovaĝajn berojn kaj fungojn: julie maturas mirteloj kaj hamemoroj, septembre ruĝaj vakcinioj abunde. Ekde aŭgusto troveblas multegaj specoj da fungoj. Bova Festo (Oxhållja), la plej granda merkato de tuta Svedujo kun pli ol kvardek mil vizitantoj, okazas en apuda urbo Filipstad la unuan semajnfino de septembro, samtempe kun jar-kunveno de EG. Iom poste komenciĝos ĉasado je alkoj. Vintre eblas skii.

✉ Esperanto-Gården, SE-680 96, Lesjöfors, Svedio,

☎ + 46 590 309 09 (enlande 0590-309 09),

✉ egarden@esperanto.se

Optimismo, malgraŭ sismo

Vespere la 26an de decembro okazis granda (ĉirkaŭ 7-grad) tertremo en sudo de Tajvano. En la gubernio Pingtung, kie mi loĝas, almenaŭ unu mortis, kelkaj vundiĝis kaj iuj domoj estis iom damaĝitaj. Estas incendioj en iuj lokoj.

Multaj telefonis al mi kaj iuj skribis ret-leterojn por demandi pri nia sano. Do, ĉiuj esperantistoj kaj iliaj familioj bonfartas ĉi tie, kaj mi kore dankas pro viaj zorgoj.

Ĝuste dum la tertremo mi estis instruanta Esperanton en la urbo Kaohsiung, kie nun Esperanto plej furoras. Mi kaj miaj studentoj dum la leciono devis dufoje forlasi la klason kaj iri surstraten. Antaŭ forlasi la klason mi ricevis kotizojn de ĉirkaŭ 20 homoj, kiuj aliĝis al UEA dum la Zamenhofa festo. Jen bona novaĵo, kiu ankaŭ estas rekorda pri tia membreco ŝajne en la historio de Tajvano!

Reza Kheir-Khan



Kataluna Kongreso de Esperanto

Kataluna Esperanto-Asocio elektis Amposta, la ĉi-jaran ĉefurbon de la kataluna kulturo, por okazigi sian 33an nacian kongreson 8–10 dec 2006. Krome, por la unua fojo, eksperimente, estis organizita ankaŭ turisma antaŭ-kongreso, en kiu tri familioj ĝuis la belegajn kaj variajn pejzaĝojn de la Delto de Ebro, sed ankaŭ helpis starigi esperanto-budon en la regione grava foiro de Amposta, okazinta dum la semajno de la kongreso.

La riĉa programo, kun entute 31 eroj, turniĝis ĉirkaŭ interkulturo per plej diversaj formoj: per matena praktikado de la ĉina gimnastiko ĉikongo, per prezento pri okcitanlingva libro pri ukraina revolucio, per prelegoj pri la islamaj katalunoj aŭ de la lingva kaj kultura diverseco en Nepalo, per ateliero pri interkulturo, per kunveno de *Monato*-abonantoj, per koncertoj de Jomo kaj *Kaj Tiel Plu*...

Entute 15 prelegantoj, i.a. Stefan Maul, Przemek Grzybowski kaj Mukunda Pathik, kaj du altiraj koncertoj allogis 134 aliĝintojn, inkluzive de 23 alilandaj esperantistoj el naŭ diversaj landoj.

Kiel kutime en la katalunaj Esperanto-kongresoj, parto de la programo estis katalun-lingva por interesigi ne-esperantistojn, sed la temaro ne nepre rekte rilatis al esperanto: ekz. tiukadre, la renoma socilingvisto Jordi Solé Camardons nacilingve prelegis pri la multlingveco en la katalunaj lernejoj.

Aparte menciindas la sukcesa informado pri la kongreso. 150 monstrofenestroj de la 20.000-loĝanta Amposta estis kovritaj per kongres-afiŝoj, dum du-metrojn altaj afiŝejoj tra la urbo informis pri la programo. La loka radio regule dissendis reklamon, kun muziko de Jomo kaj *Kaj Tiel Plu*, en kiu oni invitis partopreni la koncertojn kaj la nacilingvajn programerojn.

Reeĥe al la varbado, okazis kortuŝa anekdoto: la vizito de ŝafisto kun lia edzino, kiu venis vidi la kongreson post la enstaligo de la bestaro kaj ĝuis la etoson per infana miro.

Naci-skale, aperis entute 15 gazetaj informoj pri la kongreso kaj ankaŭ novaĵeto pri ĝi en la dimanĉaj tagmezaj novaĵoj de televid-kanalo: senteble pli ol kutime.

Entute, laŭ la organizintoj, ĉiel sukcesa kongreso.

Kataluna Esperanto-Asocio



Amposta: En la Kataluna kongreso oni ne nur laboris. (Fotis Sjoerd Bosga)

Nova erao, ĉu nur por futbalo?

Por la 14a fojo UTE (Unuiĝo Togolanda por Esperanto) organizis sian kongreson, ĉi-foje kun la temo *Kia estonteco por Esperanto en Togolando*. Je la Kristnaska semajnfino en la urbo Masseda kunvenis 72 geesperantistoj.

Antaŭ la malfermo anoj de la junulara sekcio JOTE rakontis pri Esperanto al loĝantoj de Masseda, kaj kelkaj el ili poste decidis starigi E-klubon.

La laborprogramo enhavis komitat-kunsidon, ĉefteman diskutrondon, disdonon de diplomoj, renkontiĝon kun lokaj aŭtoritatoj, kaj ĝeneralan asembleon kun raportoj kaj elektoj de gvidorganoj de UTE kaj JOTE.

Krom la kutimaj distraĵoj (skeĉoj, kvizo, balo) en la kongreso okazis futbala matĉo inter la kongresa teamo kaj la loka teamo *Les lionceaux* (leonidoj) de Masseda. La kongresa teamo gajnis

per tri goloj kontraŭ nulo. Tiu ĉi venko anoncis novan eraon por la futbalteamo de UTE (vd. la suban foton) kiu delonge ne gajnis kongresan matĉon.

Apéléké Agbolo

Tradicia Nordfrancia

La 18a Nordfrancia Eŭropa Rendimento okazis 18–19 nov 2006 en Morbecque. Krom kvin divers-nivelaj kursoj, estis ankaŭ distra vespero, kiun majstre animis Helen Fantom el Britio; ŝi faris ankaŭ bonegan prelegon pri “Esperanto kiel ilo pri lingvoj kaj kulturoj al 7–11-jaraj infanoj”.

Kristin Tytgat, el Belgio, gvidis konversacian rondon por spertuloj pri la temo: “Multlingveco en la EUMembroŝtatoj kaj en la EU-institucioj”. Katja Lödör kaj Hans Delnat el la belga klubo de Gent proponis belegan libroservon.

Richard Valen, France Valet



Unufraze

★ Je 20 jan 2007 al la 92a UK en Jokohamo aliĝis 1278 personoj el 50 landoj; inter ili pli ol duono (750) estas el Japanio; sekvas Koreio 69, Germanio 50, Francio 44, Litovio 32, Ĉinio 29, Italio 25, Nederlando 24, Pollando 22. (www.uea.org)

★ E-Asocio de Britio 3-5 nov 2006 denove partoprenis en *London Language Show* per propra stando, ĉe kiu ĉ. 500 personoj prenis E-informpakaĵon. (*EAB Update*)

★ *Espéranto-Vendée* partoprenis, kiel kunorganizanto, en la tradicia Semajno de Internacia Solidareco en La Rochesur-Yon, Francio. (*La Sago*)

★ *Radio Corax* en Halle (Germanio) emisias unuoran programon en/pri Eo la duan dimanĉon de ĉiu monato je 11h00, kun ripeto dek tagojn poste (merkrede) je 17h00 en la frekvenco 95,9 Mhz.

★ E-instruisto estas unu el la protagonistoj de la dramo *La mejor solución* (La plej bona solvo) de la argentina verkisto Hernán Morán. (*Heroldo de Esperanto*)

★ En januaro Kultura Kooperativo de E-istoj (Rio-de-Ĵaneiro, Brazilo) sendis la 55-an libro-pakaĵon, kadre de la kampanjo “Eo en la bibliotekojn”, al la “Biblioteka Municipal Poeta Manoel Baptista”, en la urbo Cambuci, Brazilo. (Aloisio Sartorato)

★ Internacia Komunista E-ista Kolektivo sendis al la Ministerio pri Internaj Aferoj de Ĉeĥa Respubliko protestleton kontraŭ malleĝigo de la Komunista Junulara Unio de Ĉeĥio. (*Internaciisto*)

★ Decembro 2006 iĝis rekorda monato en la historio de *Libera Folio*: sume dum la monato ĉi tiu retejo ricevis pli ol 95 mil vizitojn; estis legitaj 266 mil paĝoj; la mezuma ĉiutaga kvanto de vizitoj superis 3 mil. (*Libera Folio*)

★ Laŭ enketado inter la legantoj de la revuo *Esperanto* ili legas ankaŭ aliajn gazetojn: *Monato* 42%, *La Ondo de Esperanto* 18%, *Kontakto* 16%, *Heroldo de Esperanto* 11%. (*Esperanto*)

★ Je la jarŝanĝo en la germana urbo Wewelsburg okazis la 50a Internacia Seminario kun 197 e-istoj el 27 landoj. (Povilas Jegorovas)

★ Post eldono de triobla (4-5-6) kajero de *TEJO Tutmonde* Joel Amis ekŝiĝis kiel ĝia redaktoro; la nova redaktoro estas Marcos Cramer. (*TEJO Tutmonde*)

★ Eŭropa Universitato *Justo* (Moskvo) okaze de sia 10-jariĝo produktis specialan kolorplenan trilingvan (rusa, angla, Eo) eldonon de *Scienco kaj Kulturo* sur 48 paĝoj A4. (*Scienco kaj Kulturo*)



Studi per Esperanto

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) estas trijara postmatureckzamena lernejo funkcianta ekde 1991, laŭleĝe registrita. En la studumo instruas lekciistoj de AIS kaj AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB), Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Universitato Kazimiro la Granda k.a.

En ISTK povas studi ĉiu persono, kiu finis 18-an vivojaron kaj havas almenaŭ meznivelan edukitecon (maturec-ekzamenon) kaj bonan sanstaton. Plena eduk-ciklo daŭras tri jarojn kaj permesas akiri sciojn necesajn por labori en naŭ profesioj:

post la 1a studjaro — kvalifikoj: lektoro de Esperanto por komencantoj kaj gvidanto de porinfanaj aranĝoj; profesioj/postenoj: oficisto pri turisma informado (422104), oficisto en vojaĝ-agentejo (422103) kaj internacia vojaĝgvidanto (511301);

post la 2a studjaro — kvalifikoj: lektoro de mez-nivelaj kursoj de Esperanto kaj verkanto de arta ceramiko; profesioj/postenoj: organizanto de turisma priservado (341401), regiona turisma ĉiĉerono (511304) kaj animanto de kultura agado (347601);

post la 3a studjaro — profesioj/postenoj: kursgvidanto de Esperanto (235910), specialisto pri organizado kaj disvolvo de turismo (241915) kaj specialisto pri organizado de kulturo (241990); ev. titolo de bakalaŭro de AIS pri humanistiko aŭ morfosciencoj.

Laŭ dekreto de la pola Ministro pri Edukado (1 aŭg 2000) fin-diplomoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo validas kiel oficialaj polaj

dokumentoj rajtigantaj ĉiĉeronojn kaj vojaĝgvidantojn labori en Esperanto. En la jaro 2007/2008 kadre de la Studumo oni planas kunlabore kun Oficejo de Vojaĝantoj *Flugo* gvidadon de specialigitaj kursoj pri turismo, kulturo kaj entreprenado kaj ankaŭ konversaciaj lingvokursoj. Eblas ankaŭ partopreni semajnajn kursojn kun studentoj de ISTK/AKB.

Kunlaboro kun AIS San Marino kaj sciencaj institucioj en Pollando permesas akiri sciojn pri diversaj branĉoj de scienco — i.a. pri ekologio, eŭrologio, etnologio, etnografio, kultur- kaj sociogeografio, interlingvistiko, historio, politikaj sciencoj, komerco, merkati-ko, estrado kaj de pluraj lingvoj.

Dum la jaroj 1991–2006 lecionojn en la Studumo gvidis lekciistoj el 55 landoj de Eŭropo, Afriko, Ameriko, Azio kaj Aŭstralio por gestudentoj el 85 landoj de la mondo.

Gestudentoj de la studumo povas studentigi ĉe AIS, kio al ĉiuj finstudintoj permesas akiri la titolon de bakalaŭro, kaj, post pliaj du studjaroj, eĉ magistro de AIS pri humanistiko aŭ morfosciencoj.

Pri la aliĝado, kosto de la studado kaj aliaj demandoj petu informojn ĉe ISTK: ✉ ul. M.Skłodowskiej-Curie 10, 85-094 Bydgoszcz, ☎/fax: (+48 -52) 346-11-51, ✉ stud@esperanto-turismo.com

Sekretario de la Program-Konsilio
mag. **Wojciech Rumiński**
Prezidanto de la Program-Konsilio
ASci.mag. **Andrzej Grzębowski**

Nova aŭstria poŝtmarko

La unuan de januaro 2007 aperis sur aŭstria poŝtmarko la turfalko, la “birdo de la jaro 2007”. La teksto estas en la germana lingvo kaj en Esperanto.

Walter Klag





Tri novaj lingvoj

(Vide el Bruselo) Jam nun aŭdeblas la klaraj sonoj de la bulgara, rumana kaj irlanda en la koridoroj de la Eŭropa Komisiono en Bruselo. Per tio la nombro de “oficialaj” lingvoj kreskis ĝis 23. La bulgara kaj rumana fariĝis oficialaj lingvoj post la eniro de Rumanio kaj Bulgario. La irlanda aldoniĝis post la premo de la Irlanda registaro, kiu en 1973 ne insistis pri la oficialigo de la irlanda kiel eŭropunia lingvo.

Laŭ la Eŭropa Parlamento (EP) la oficialigo de la tri novaj lingvoj “respegulas la kulturen heredaĵon de Eŭropo kaj la principon ke ĉiuj EU-civitanoj havas aliron al dokumentoj kaj informoj en siaj propraj lingvoj. Ĝi ankaŭ signifas ke debatoj en la Parlamento aŭdeblas en tiuj lingvoj”.

Tamen en 1957 estis nur kvar lingvoj: la nederlanda, franca, germana kaj itala. En 1995 estis 11 oficialaj lingvoj — la sama nombro kiel en Sudafriko. Post la “granda” pligrandiĝo de EU en majo 2004 oficialiĝis pliaj naŭ lingvoj. Hodiaŭ ne nur 23 lingvoj estas oficialaj sed ankaŭ tri alfabetoj, nome, la latina, greka kaj cirila. Tiuj, kiuj volas redukti la traduk- kaj interpretokostojn nur trovas konsolon en la fakto ke estas malpli da lingvoj ol la 27 ŝtatoj.

Politikistoj en Bruselo ne tediĝas diri, ke paroli la propran lingvon estas esenca parto de demokratio. “Pro tio membroj de la Parlamento havas la rajton debati en iu ajn oficiala lingvo laŭ siaj elektoj. Ankaŭ ĉiuj oficialaj dokumentoj devas esti tradukitaj en ĉiuj oficialaj lingvoj. Ne-kaze la jura statuso ne povas esti garantiita. Tio devas esti respektata dum la organizado de parlamenta laboro”.

En 2005 eŭropaj lingvaj servoj tradukis 1.324.231 paĝojn kaj la kosto egalas “nur” unu elcenton de la eŭropa buĝeto. Tamen la Eŭropa Financkontrola Kortumo kritikis eŭropajn instancojn pro malŝparo de ĉirkaŭ 11 milionoj da eŭroj en la uzado de sendependaj tradukistoj. Mankas klaraj kalkuloj pri la tradukkostoj. Laŭ la Kortumo, la kosto de unu tradukpaĝo estis 194 en la Komisiono, 276 en la Konsilio, kaj nur 119 en EP. Kiel la Parlamento sukcesis malaltigi la kostojn, kvankam ili altiĝis en la Konsilio kaj Komisiono?

Laŭ raporto de EP-ano Alexander Stubb, kosto de interpretisto en EP estas ĉirkaŭ 1500 eŭroj por unu tago. En la Eŭropa Komisiono interpretisto kostas “nur” 1000 eŭroj tage. “La plena kosto da interprettago estas je 30% pli alta en la Parlamento ol en la Konsilio kaj Komisiono”, — diris Stubb (LOdE, 2006, №144). La kosto de interpretado en 2003 estis 57 mln en la Eŭropa Parlamento kaj 106 mln en la Konsilio, Komisiono kaj aliaj agentejoj. Plej gravas la fakto ke ĉirkaŭ 16% (25.9 miliono) de la totalaj interpretadkostoj en 2003 estis elpezitaj por nenio! EP-anoj petas interpretadon pro principo kaj poste ne aperas.

Dafydd ab Iago

Bulgaroj kaj rumanoj nun rajtas paroli siajn proprajn lingvojn en Bruselo.

Minoritataj lingvoj

En *La Ondo de Esperanto* (decembro 2006), Daffyd ab Iago skribis interesan artikolon *Multlingvismo: Eŭropa Parlamento debatas minoritatajn lingvojn*. Daffyd citis, ke la kataluna deputito Bernat Joan i Marí prezentis raporton pri plurlingvismo, kiu estis aprobita per 537 voĉdonoj por, 50 kontraŭ, kaj 59 sindetenoj.

Joan i Marí diris: “Ĉiuj grupoj de lingvoj devas esti respektataj kaj subtenataj. La subtenado de lingva diverseco estas unu el la celoj de eŭropaj instancoj”.

Vere, ĉiuj lingvoj de la homaro, multe aŭ malmulte parolataj, formas parton de la universala kulturo, kiel antikvaj konstruaĵoj, gravaj verkoj de literaturo, muziko, ktp, kaj ilin oni devas respekti, protekti kaj konservi. Neniu lingvo devus malaperi.

Joan i Marí manifestis: “Tia politiko promociu multlingvismon, plibonigu la lingvajjn konojn de la civitanoj en la Eŭropa Unio. Pro tio la eŭropaj buĝeto kaj programoj devas subteni ne nur la ĉefajn lingvojn, sed ĉiujn lingvojn, kaj tiel plibonigi diversecon. Ĉiu lingvo estas bona por la homaro”.

Koni kaj regi multajn lingvojn estas grava persona lernaĵo, sed tio estas neniu baro kontraŭ la agnosko kaj bezono de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto.

Daffyd ab Iago ankaŭ skribis: “Kataluna dekstrulo Alejo Vidal Quadras kiu tamen voĉdonis kontraŭ la kataluna lingvo kiel oficiala lingvo en la Parlamento kaj kritikis la naciismon de la raporto-skribanto Joan i Marí”.

Eble surprizas iujn, ke kataluno voĉdonis kontraŭ la oficialigo de la kataluna lingvo, sed malgraŭ la dekstra Populara Partio, Hispanio estas demokrata lando; ene de tiu ĉi partio estas kelkaj partianoj, kiuj ankoraŭ havas nostalgion al la reĝimo de la diktatoro Franco. Tiu diktatoro volis malaperigi la katalunan lingvon.

La konduto de Vidal Quadras estas stranga, sed la historio montras ke en ĉiu popolo estis uloj, kiuj agis kontraŭ sia propra lando.

Martí Guerrero

Ankoraŭfoje pri prepozicioj

Jean-Marie Ries demandas sin “Kiu rajtas kion?” (LOdE, 2007, №1, pĝ. 16) Nu, prava demando. Kaj li pravas per/kun la sama pravo de ĉiu alia. Mi konstatas, ke li bone (kaj rajte) defendas sin. Sed kontraŭ kio aŭ kiu? Tiu rimarko mia tute ne estis intencita por publikigo. Nur persona pasema impresio. Mi dankas s-ron Ries, ĉar li atentigas min pri la neceso esti pli singarda. Mi supozas, ke lia lasta frazo validas ankaŭ por li, rilate mian “romanon”. Do mi ĝojas, reciproke.

Ĝuste la prepozicioj, en Esperanto multe pli logike kaj laŭsence uzataj ol en etnaj lingvoj, tamen lasas limkazojn sen solvo. Inluas nin, kion ni lernis. Prave, “ludi kun” estas Zamenhofa. Do ĝusta! Tamen lernolibroj ofte insistas pri “per”. Kaj en PIV troviĝas ankaŭ ekzemploj: *jonglisto, kiu ludas per ponardoj; ludi per vortoj*.

Ries pensis: Mi ludas (per miaj manoj) kun la piedfingroj. Nu jes. Sed momente de mia rimarko mi pensis pri alia opozicio: kun (kune kun) / per, ĉar ja oni edziĝas, parolas, iras, manĝas, ludas kun partnero. Eble tio blindigis min, sed persone mi ankoraŭ skribus: Li ludis kun kamaradoj per pilko.

Christian Declerck

Kial tiaj uloj subtenas Esperanton?

Evidentiĝas ke Targalski estas nur unu el la iloj de la ekstrem-dekstrula nuntempa registaro de Pollando, vere retroira por lando membriĝanta en la Eŭropa Unio. En *La Ondo de Esperanto* aperis en decembro artikolo de Komitatano Z en kiu, rilate al la afero Pola Radio, li diris interalie:

“Ne estus perdo ne plu aŭdi propagandon de registaro, kiu estas unu el la plej mallumaj en Eŭropo kaj honto por EU, kiu kokete lekcias al aliaj pri demokratio kaj esprimlibero. Esperige ja estas, ke poloj mem ekhontas pri siaj estroj, kies populareco jam multe falis”.

Nu, en la januara numero de *La Ondo* elmontras sian indigniĝon pro tiu atako al la pola registaro s-ro Lech Piotrowski, prezidanto de la Varsovia Filio de PEA, kaj anoncas la malabandon de tiu filio al la revuo.

Oni komprenus tiun reagon, se *La Ondo* estus rekte atakinta la polan nacion, sed temas nur pri kritiko al ties ekstremdekstreca registaro, kiu favoras ulojn kiaj Targalski. Do, ŝajne la esperantisto Lech Piotrowski estas tre kontenta kun sia retroa registaro, kiu, krom la murdo de la Esperantaj elsendoj de Pola Radio, nun anstataŭotaj per minusvalorigita programo nur interreta, ofertis al la eŭrop-unianoj perlojn kiaj la polica persekuto al geja manifestacio en Poznano, la subteno al la mortopuno far la Prezidento, la saboto de la ekonomiaj konversacioj de EU kun Ruslando, la preparo de kontraŭ-abortiga leĝo, ktp ktp.

Mi miras pri esperantistoj tiom malkongruaj kun la Zamenhofa idealo. Kial tiaj uloj tamen subtenas Esperanton?

Dario Rodriguez

Ĉiu vidas, kia estas la ĉevalo

Via revuo estas tre ŝatata de nia malgranda esperantista rondo en Etk; ĝi estas vere sendependa, aperiganta diversajn vidpunktojn pri la aferoj mondaj kaj esperantaj.

Treege mirigis min la letero de miaj samlandanoj el Varsovio, kiuj sentas sin ofenditaj pro la opinio de Komitatano Z. pri nia registaro. Sed ... “ĉiu vidas, kia estas la ĉevalo”, — diras nia proverbo. Do ne nur unusola Komitatano Z. “malrespekte kaj arogante” atakas polajn aŭtoritatojn. Se oni tiamaniere aliros ĉies alian opinion ol la propra, oni devas senti sin ofendita fare de multaj aliaj revuoj, kaj ne nur Esperantaj. Post la selektado restos por la “ofenditaj” eble du? tri? kelkaj? revuoj, indaj por legi.

Dorota Burchardt



Ni esperas, ke veteranaj varsoviaj esperantistoj plu legos *La Ondon*, almenaŭ kiel individuaj abonantoj. (Fotis Mariusz Majewski)

Ne detruu miajn cirklojn!

Lech Piotrowski — prezidanto de la Varsovia Filio de PEA kaj multaj ĝiaj membroj — kiel li skribas, plej rajte povas rezigni pri abono de *La Ondo* kaj plua popularigado de la revuo (LOdE, 2007, №1, pĝ. 16). La fakto mem okulfrapas jam pro analogio al reĝo, kiu mortigis heroldon de malbona novaĵo.

Pli interesas, ke tiu ĉi publika deklaro aperas en momento kiam esperantistoj amase protestis kontraŭ la fermo de la Esperanto-redakcio de Radio Polonia pro politikaj ideologiaj kialoj, kion permesis tiu ĉi registaro. Pri tio temas en la artikolo de Komitatano Z publikigita en la decembra *Ondo*.

La argumentado de la malabonanto evitas iujn ajn esencajn klarigojn. Laŭ li la aŭtoro atakas la polan registaron: ege arogante, malrespekte, nekredible krude, brutale, ofendante multajn membrojn. Oni povas rimarki, ke malfacile estus ricevi pli akran bildon de pensadmaniero, en kiu ne gravas enhavo, sed gravas sentoj, kiujn ĝi elvokas.

Kiel polo, leginte pri la “atako” mi ekhavis unue patriotisman impreson, ke mi devas rapidi kun helpo, ĉar “ili batas niajn”. Sed kontrolinte la tekston de Komitatano Z, mi trankviligis. Tiuj “niaj” malbone pritaksis la situacion. Por ili “atako” signifas specifan stilon de la teksto de Komitatano Z, siavoje esence principe trafa. Malgraŭ tio, ili — kun prezidanto L. Piotrowski — ne alfrontis la problemojn. Ne kontraŭargumentis, ke politiko gvidanta al nuligo de grava elemento de la Esperanta amaskomunikado, kaj nacia pola kulturo, ne devas esti ligita kun pola estraro.

“Mortiginte” la revuon, malabonanto povas konservi sian senton de heroo viktimo. Heroa, ĉar ne ektimis “atakon”. Viktimo, ĉar ekestis ofendita pro ne deca konduto, stilo, de la aŭtoro. La precedenco montras paradokson de bonintencoj. Jen en la esperantisto venkas senkritike komprenata ŝtat-nacia identeco. Rezulte li iĝas nekapabla agi baze de sia propra Esperanta identeco, tro malforta.

La kazo de L. Piotrowski montras bezonon ekzistantan ne nur ĉe esperantistoj: lerni esence politike diskuti eĉ akre kun alipensantoj, same kiel superi pensadon per sentoj. Sur tiu ĉi vojo ne helpas ĝisnuna neŭtraleca fono de UEA, malproksima de politikumeco de apartaj esperantistoj kaj iliaj revuoj. La politikan defion rilate al Esperanto la malabonanto reduktas al politika pritakso de la nacia estraro. Tiel li evitas nunan demandon pri kunligo de politiko kaj Esperanto. Al aŭtoroj, kiuj informas lin pri praktikaj problemoj de danĝera agado de politikistoj en Esperanta sfero, li ŝajnas nur sindefende diri: ne detruu miajn cirklojn!

Zbigniew Galor

Ni rajtas nin defendi

Forte mi miris la sintenon de Lech Piotrowski, kiu ne kapablas vidi la aferojn lige kun Pola Radio sobre kaj klare. Iuj poloj jeteris koton kontraŭ vizaĝojn de multaj fidelaj gemikoj de Pollando kaj la pola popolo. Tamen mi ŝatas Pollandon, ĝiajn civitanojn, kvankam iu Lech Piotrowski naive atakas prestiĝan revuon *La Ondo de Esperanto*.

Varsoviano Antoni Grabowski esprimis sin jene: “Se venus ankoraŭ ventegoj, batal’, / Ni estas jam bone harditaj; / Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal’. / Nek ies perfidoj subitaj”.

Ni rajtas nin defendi kontraŭ kruelaj nuntempaj atakantoj, kiuj trompas kaj perfidas sian propran patrujon, kiun alte taksas aŭskultantoj de Esperanto-elsendoj el Varsovio. “Ho, mia kor”!

Jorma Ahomäki

Por konkreta solidareco

Mi gratulas al vi pro la bona kaj multflanka enhavo. Same mi tre bedaŭras, ke abonantoj ofendiĝas pro certaj artikoloj kaj foje eĉ malabonas vian revuon.

Unu el multaj elementoj de demokratio estas, ke ekzistas diversaj opinioj kaj ke oni povas senĝene esprimi ilin, tion ĉiu leganto devas elteni. Aliflanke li/ŝi rajtas sendi sian kontraŭan respondon al la redaktoro. Feliĉe tio ofte ĉe *LOde* jam okazis kio pruvas, ke en ĝi regas sana atmosfero.

Ankaŭ mi mem tre ofte havas tute alian vidpunkton kompare al la redaktoro aŭ aŭtoro de certaj artikoloj kaj kompreneble koleriĝas.

Krome, kaj tio estas tipa afero de Esperanto-movado, kion ni neniam forgesu: ĝenerale niaj revuoj nur dependas de niaj abonantoj kaj ne de iu ekonomia potenco, kiu kaŝite kaj per mono stiras la enhavon de publikaj medioj en niaj socioj.

Do, niaj Esperanto-revuoj tre bezonas la konkretan solidarecon de ni ĉiuj ke ili estu kaj restu. Mi kore invitas tiujn, kiuj planas ĉesi abonon, ke ili revenu al la legantaro.

Werner Pfennig

Por pli fakto-riĉaj recenzoj

En la januara numero de *La Ondo* min malagrabla surprizis du recenzoj.

La unua, fare de Alen Kris pri *Etimologia vortaro de propraj nomoj* preskaŭ nenion diras pri la enhavo kaj la strukturo mem de la libro (miaopinie sufiĉe originala): 1–2 frazoj en pli ol duonpaĝa artikolo ne estas multe, ĉu ne? Signife pli grandan parton okupas citado de la antaŭparolo al la libro kaj iom stranga lamentado pri tio, ke la informoj pri la antaŭa verko de A. Cherpillod (*Konciza etimologia vortaro de Esperanto*) atingis la recenzinton tro malfrue (el kio estas tirataj la signifoplenaj konkludoj pri “manko de propono kaj malforto de la servaj mekanismoj” en Esperantujo). Strange, ke la recenzinto, aplombe fanfaronanta pri la fakto, ke li parolis Esperante jam 10 jarojn antaŭ la esperantistiĝo de B. Wennergren (aŭtoro de PMEG, detale miskritikita de A. Kris kelkajn monatojn antaŭe), ne kapablas foliumi la revuon *Esperanto*, kiu aktive reklamis ambaŭ librojn de A. Cherpillod dum multaj monatoj. Ĉu ne tro senbazas la lamentoj?

La dua recenzo — de Glebo Malcev pri la disko *Supernova* — same ne riĉas je faktaj informoj pri la recenzata objekto. Kompense la aŭtoro elsputas la sinlaŭdajn komentojn (“kial mi ĉiam unuafojas?!”), uzante la lingvaĵon iom pucan kaj tute netaŭgan, miaopinie, por la revuo kiel *La Ondo*. Ĉu ne tro senseca recenzo?

Mi estus ĝoja, se la recenzantoj konsiderus la fakton, ke la paĝoj de la revuo ne estas loko por elmontri siajn ambiciojn kaj pretendojn, ke la revuo estas nek lamentejo nek stil-retorto. Tiukaze la recenzoj iĝos pli fakto-riĉaj kaj la revuo — eĉ pli bonkvalita.

Pavel Moĵajev

15 jan 2007 en la aĝo 98 jaroj forpasis

d-ro Yamazoe Saburoo (1908-2007)

meritplena profesoro instruinta medicinon en kelkaj universitatoj; esperantisto ekde 1928, aktivulo de la Gunma Esperanto-Societo, aŭtoro de Angla-Esperanta kaj Esperanta-Angla Medicina Terminaroj, laŭreato de la premio *Ossaka* de la Japana E-Instituto, honora membro de UEA.

Oficialaj informoj de la Akademio

Numero 6

2007 01 21

La Akademio de Esperanto ĵus voĉdone aprobis la jenan raporton de la Sekcio pri prononcado (33 akademianoj voĉdonis jese, 5 nee kaj 1 sindetene).

Pri apartaj teknikaj bezonoj rilate al niaj alfabeto kaj ortografio

La Akademio de Esperanto konfirmas sian pozicion, jam esprimitan en 1982, ke la ortografio de Esperanto, kiel ĝi estas prezentita en la Fundamento de Esperanto, konformas perfekte al la karaktero de la lingvo, kaj ke neniu ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda.

Nur kiam la cirkonstancoj ne permesas uzi la ĝustajn supersignojn, kaj kiam pro apartaj bezonoj la Fundamenta anstataŭa skribsistemo (ch, gh, hh, jh, sh, u) ne estas oportuna, oni povas anstataŭigi la supersignajn literojn per aliaj signoj aŭ signokombinoj. Tiam anstataŭigon, kiam ĝi estas nura teknika rimedo, ne celanta reformon de la ortografio de Esperanto, kaj kiam ĝi neniel kaŭzas konfuzon, oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentan.

Ekzistas ankaŭ aliaj cirkonstancoj, kiam nia lingvo estas prezentata alimaniere ol per la normala skribo, ekz. en stenografio, morse, brajle, per fonetika transskribo k.s., kaj kiam teksto Esperanta estas konservata aŭ transsendata elektronike en cifereca formo laŭ diversaj kodsistemoj, kaj ankoraŭ aliaj similaj okazoj. Ankaŭ tiajn manierojn skribi, transskribi aŭ prezenti nian lingvon oni ne rigardu kiel kontraŭ-Fundamentajn.

Geraldo Mattos

Prezidanto de la Akademio de Esperanto

La ĉi-antaŭa Akademia deklaro estas kompletigo de la jena rezolucio publikigita jam en 1982:

Pri niaj alfabeto kaj ortografio

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobado diversajn proponojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniu ortografia ŝanĝo estas necesa aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo, kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: “Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ povas anstataŭi ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u”.

Por la Akademio, ties Prezidanto,

William Auld

Leterkesto

La Ondo de Esperanto estas impona eĉ por la neesperantista publiko, enhavoriĉa, interesa kun multaj bildoj, eĉ koloraj, presita sur bonkvalita papero. Gratulon! Mi ĝojas, ke mi povos montri ĝin en nia (bedaŭrinde) malmultnombra Esperanto-klubo, kiu kunvenas nur unufoje monate.

Vlastimil Novobilský (Ĉeĥio)

Prokrasto de la januara kajero de *La Ondo de Esperanto??* Por mi, ne estas prokrasto, kiam la kajero aperas en mia leterkesto la 15an de la koncerna monato. Mi gratulegas al la skipo, kiu, malgraŭ gravaj san-problemoj, akurate redaktis la revuon kaj mi bondeziras por 2007.

Louise Marin (Francio)

Eldonado en Esperantujo: jaro 2006

Revuo de Aleksander Korĵenkov

Manko de kontinueco estas karakteriza trajto de nia amatora lingvokomunumo, kies pluekzistadon garantias neniu formala kadro. Pro malapero de gazeto aŭ asocio, pro kabeo aŭ forpaso de gvidanto aŭ responsulo, eĉ pro malfavora konjunkturo, en Esperantujo pluraj utilaj projektoj ĉesas.

Tamen estas esceptoj. Ekzemple, post kiam en 1990 *Hungara Vivo* estis fermita, *La Ondo de Esperanto* reprenis ĝian regulan prezentadon de la Esperanta libroproduktado. Same kiel la legenda budapeŝta gazeto, nia referenco estas la rubriko *Laste Aperis* en la revuo *Esperanto*, kiu registras ĉiujn librojn, kiujn la Libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro, sendepende de la eldonjaro. Ĉar ne ĉiu eldonita libro estas vendata de UEA kaj ĉar ne nur freŝe eldonitajn librojn ĝi ekvendis, ni aperigas ne nur jartabelojn, sed ankaŭ resumajn tabelojn, kiuj estas pli reprezentaj.

Do, nia ĉiujara raporto konsistas el tabeloj kurantaj kaj resumaj, kaj el komentoj. Nu, ankaŭ la komentoj foje similas al tabeloj, kaj eble utilas ripeti kelkajn el la pasintjaraj. Ekzemple, antaŭ unu jaro mi skribis: “159 libroj estas la plej magra rezulto en la lastaj kvin jaroj, ankaŭ la suma paĝokvanto (23 mil 780 paĝoj), sed la sperto diras ke tio apenaŭ estas signo de malfortiĝo de la esperantista eldonado, kaj ke post unu jaro ambaŭ nombroj kreskos”. (Vidu, ambaŭ kreskis tre kontentige.)

“En la resuma tabelo vi povas mem vidi ĉion, sed eble ni komparu kun la stato antaŭ kvarona jarcento, kiam Esperanto, laŭ kelkaj, estis *floranta*: en 1980 surmerkatiĝis 132 libroj sur entute 15.091 paĝoj”. (Multe malpli ol en 2006.)

El la 204 libroj 94 libroj aperis en 2006, 72 libroj en 2004, kaj po kelkaj libroj en antaŭaj jaroj “kun atentinda escepto de la jaro 1993, kiu ĉi-jare grave influis la statistikon...” Por ne daŭrigi tro longe, temas pri tiujaraj represoj de diverstemaj franclingvaj artikoloj de Edmond Privat. Danke al ili *Libro-Mondo* (foje kunlabore kun *Arĥivaro Edmond Privat*) pro siaj malnovaj represoj denove estas supre en la jar-tabeloj.

Se temas pri “veraj libroj”, plej multe eldonis UEA, kiu do sekvas dualoke ĉi-jare kaj sume.

2006. Libroj

Libro-Mondo (PL)	13
UEA (NL)	11
Impeto (RU)	8
KAVA-PECH (CZ)	8
FEL (BE)	7
Flamo (PL)	6
Hejme (PL)	6
Arĥivaro E.Privat (CH)	5
Edistudio (IT)	5
S.E.S. Lorenz (BR)	5

2006. Paĝoj

Libro-Mondo	2464
KAVA-PECH	1315
Arĥivaro E.Privat	1304
UEA	1260
FEL	1169
Impeto	1118
Mondial (US)	877
W.Nüesch (CH)	777
Edistudio	772
S.E.S. Lorenz	734

Pri la 16-jara periodo nenio aldonendas al la pasint-jara komento: “La privata eldonejo de Tomasz Chmielik, *Libro-Mondo* ... nun estas la plej aktiva libroproduktanto en Esperantujo dum la lastaj 15 jaroj. Oni vidas, ke nur 5 eldonejoj aperigas averaĝe almenaŭ unu libron ĉiusezone”.

1991-2006. Libroj

Libro-Mondo	127
UEA	117
FEL	82
Fonto (BR)	74
Sezonoj	65
KAVA-PECH	54
Arizona Stelo (US)	52
Impeto	52
Bero (NL)	51
ĈEE (CN)	51

1991-2006. Paĝoj

Libro-Mondo	16587
UEA	13265
FEL	12727
Arĥivaro E.Privat	12553
Ludovikito (JP)	12085
Fonto	11273
Sezonoj	10218
ĈEE	10161
KAVA-PECH	9241
Impeto	7650

La landliston denove influis la kongreso. Italio estas en la unua triopo. Sed “... la Universala Kongreso mobilizas la movadon antaŭ kaj dum la kongreso, sed post la kongreso kutime venas meritita ripozo. Tiel estis en 2003 en Svedio (11 libroj en la kongresjaro 2003, nur 1 en 2004, neniu en 2005) kaj en Ĉinio (12 libroj en la kongresjaro 2004, neniu en 2005), sed la litovia kazo estas aparta, ĉar la eldonado tie sekvas planon. Litovio certe konservos ankaŭ venontjare sian dignan lokon en la landodeko”. Nu, Litovio kun 7 libroj dividivas kun Belgio, Japanio kaj Slovakio la lokojn 10-13.

Kiuloke estos Japanio kaj Italio post unu jaro?

	1991–2000, sume aŭ averaĝe	2001	2002	2003	2004	2005	2006
Nombro de libroj en/pri Esperanto	2107	222	174	224	183	159	204
Suma paĝonombro de ĉiuj libroj	251.276	31.520	26.451	28.424	27.295	23.780	30.078
Nombro de la eldonintoj	650	109	95	133	103	87	114
Averaĝa paĝonombro de unu libro	120.3	142	152	127	149	149	147
Averaĝa prezo de unu libro	ž8,22	ž11,2	ž11,6	ž10,3	ž10,8	ž12,7	ž11,7
Lernolibroj, vortaroj pri Esperanto	296	32	43	42	25	19	32
Originala beletro	258	21	18	24	21	14	23
Traduka beletro	458	57	18	32	45	40	35
Planlingvistiko, esperantologio, ling.	229	26	19	15	13	22	21
Esperanto: historio, movado k.s.	241	21	42	33	32	27	29
Politiko, historio, filozofio, socio	166	22	11	28	21	22	29
Scienco kaj tekniko, terminaroj	182	17	8	16	10	4	10
Religio	105	6	10	17	6	6	13
Aliaj temoj	172	20	5	17	10	5	12

2006. Libroj

Pollando	31
Nederlando	17
Italio	16
Ruslando	15
Francio	13
Svislando	11
Brazilo	10
Ĉeĥio	10
Germanio	10
Belgio k.a.	7

2006. Paĝoj

Pollando	4684
Italio	2809
Ruslando	2334
Svislando	2233
Nederlando	2000
Germanio	1839
USA	1656
Ĉeĥio	1597
Brazilo	1440
Belgio	1169

En la pasint-jara frazo pri la resuma tabelo ("La resumaj libror-tabeloj preskaŭ ne ŝanĝiĝas. Germanio kaj Francio restas la plej aktivaj kaj movade kaj eldone, kvankam Pollando ĉiam proksimiĝas al Francio") oni povas uzi *impete* anstataŭ *ĉiam*. Al tio kontribuas ne nur *Libro-Mondo* — en ĉi-jara pinta eldonejo-deko tri reprezentas Pollandon. Se la represitaj gazet-artikoloj plu estos registrataj, ni vidos Pollandon en la dua loko. Krome, Ruslando devancos Brazilon.

1991-2006. Libroj

Germanio	309
Francio	279
Pollando	274
Nederlando	224
Brazilo	184
Ruslando	183
Japanio	162
USA	147
Italio	130
Hungario	117

1991-2006. Paĝoj

Germanio	37600
Francio	34279
Pollando	30994
Japanio	30339
Ruslando	26144
Brazilo	25600
Nederlando	23540
Svislando	19818
Hungario	18199
Italio	17672


66 libroj enhavas indikon pri tradukiteco. Plej multe nian libron riĉigis la germana lingvo, el kiu aperis 7 tradukoj. Po 6 tradukoj estis eldonitaj el la lingvoj angla, franca, itala, litova, pola kaj el Esperanto. Sed "... la angla plurestas en la supro por la jaroj" 1991–2006: Angla 125 libroj, franca 107, germana 92, Esperanto 66, rusa 60, pola 48, jida kaj portugala po 44, ĉina 43, japana 37, itala 32 ktp.

Fine: la pasint-jara konkludo, kies ripeto konfirmas ĝin:

«Mi ne juĝas ĉi tie pri la kvalito de la libroj — por tio necesas legi ilin, sed ne la eldonindikojn en *Laste aperis*. Tamen, legante la librolistojn, mi ĉiam miras, kiom malsimilas ili al la kutima oferto en la ordinaraj librovendejoj. Vidu mem: dum la jaro 2005 en Esperantujo surmerkatigis neniun libro por tiuj kiuj uzas komputilon; ... neniun libro pri aŭtomobiloj, televidiloj kaj poŝtelefonoj; neniun libro teknika ... neniun libro pri hejma mastrumado; neniun libro por agrikulturistoj; neniun libro por eldonistoj kaj redaktoroj...

... sed ni povas fieri, ke en neniun alia homa lingvo aperas tiom da libroj ... pri Esperanto.»

Bonvolu pardoni la petolan ripetadon. Se post unu jaro novaj tendencoj ne estos videblaj, la statistiko aperos (preskaŭ) senkomente.



Internacia Foto- konkurso

La Ondo de Esperanto organizis en 2006 la naŭan Internacian Fotokonkurson. Partoprenis 71 fotoverkoj de 20 aŭtoroj el Germanio, Finnlando, Italio, Kanado, Kroatio, Nederlando, Pollando kaj Ruslando.

La 14an de januaro 2007 la juĝkomisiono anoncis la rezulton:

1a premio (ĝ 50 kaj abono de *La Ondo de Esperanto*): **Mauricio Bolesnik** (Italio).

2a premio (ĝ 25 kaj abono de *La Ondo de Esperanto*): **Olga Ŝipovalenko** (Ruslando) pro "Glaciaj kaskadoj".

3a premio (abono de *La Ondo de Esperanto*): **Ronaldo Bijtenhoore** (Nederlando) pro "Ventiladotuboj" kaj "Marnebululo".

Laŭdaj mencioj: **Mauricio Bolesnik** (Italio); **Jessika Dehms** (Germanio) pro "Ilekso dum malvarma vintra mateno"; **Adeltraut Henning** (Germanio) pro "Stranga frukteto"; **Jurij Kajun** (Ruslando) pro "Respegulo de la alia mondo"; **Alekseo Kozlov** (Ruslando) pro "Mortmara sunsubiro".

Specialan premion (ĝ 50 kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) pro la plej bona foto pri la temo *Naturo* ricevas **Alekseo Kozlov** (Ruslando) pro "Papilietoj".

Laŭ la regularo de la konkurso, la organizantoj ĝis la 31a de decembro 2008 havas ekskluzivan rajton uzi ĉiujn ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Dankon al la partoprenantoj!
Gratulon al la laŭreatoj!

Halina Gorecka
sekretario de la konkurso

Anoncetoj

Gimnaziaj 13–14-jaraj lernantoj el Sankt-Peterburgo serĉas leteramikojn. Ni komencis lerni Esperanton kaj volus korespondi kun alilandaj lernantoj. Ni ĝojos respondi al viaj leteroj kaj rakonti pri ni! Ni atendas viajn paperajn kaj elektronikajn leterojn.

✉ 197183 Sankt-Peterburg, ul.Savuŝkina 1/2 kv.7, Semikras A.V., Ruslando alejia@yandex.ru.

Internacia desegno-konkurso por infanoj (6–15-jaraj) pri Paskaj eventoj, pri la Pasko mem aŭ pri iu interesa evento okazinta al ili Pasko aŭ printempe, aŭ pri printempo mem. Limdato: 1 apr 2007.

✉ S-ino Gabriella Blanár, Vilaĝestra Oficejo, HU-3379 Egerfarmos, Dózsa Gy. u. 1., Hungario-Magyarország.

Ni dankas pro la gratuloj okaze de la Kristnasko kaj Novjarfesto kaj pro la kortuŝaj sandeziroj! (*HaGo, AlKo*)

Koran gratulon kaj varmajn bondezirojn ni sendas al nia brusela korespondanto Dafydd ab Iago okaze de lia patriĝo! Lia filo

Aran Iago ap Dafydd Hernandez.

naskiĝis la 3an de januaro je 18h24.

La Ondo de Esperanto



El "Mia jarcento"

de Günter Grass

En 1999 aperis *Mia jarcento* de Günter Grass — cent mallongaj rakontoj, mozaikeroj de la 20a jarcento. El malsamaj perspektivoj aperas malsamaj personoj: simpatiaj kaj malsimpatiaj, krimuloj kaj viktimoj, viroj kaj virinoj. Tiuj rakontetoj ligiĝas intime kun la germana historio, kaj finfine el la bunta ĥaoso aperas plena bildo de nia dudeka jarcento. Jam kvin ĉapitroj el *Mia jarcento* aperis en *La Ondo de Esperanto*, elektite kaj tradukite de Wolfgang Kirschstein. Nun ni proponas la sesan.

1907

Fine de novembro forbrulis la laminiga uzino ĉe la Cellea Ŝoseo — totala perdo. Kaj ni estis tiom vervaj. Sen mensogo: 36 mil diskojn ni elsputis ĉiutage. Oni kvazaŭ ŝiris ilin el niaj manoj. Kaj la vendosumo de nia gramofona sortimento kreskis ĝis 12 milionoj da markoj. Speciale bone iris la komerco, ĉar ni en Hanovro ekde du jaroj stampis diskojn, kiuj estis ludeblaj de ambaŭ flankoj. Tio ekzistis cetere nur en Ameriko. Multe da militista sonego. Nur malmulte por kontentigi pli altnivelajn gustojn. Sed tiam sukcesis Rappaport, tio estas mia modesta persono, persvadi Nellie Melba, la "granda Melba" al surdiskigo. Komence ŝi iomete faris ceremoniojn, ekzakte kiel poste Ŝaljapin, ĉar tiu terurege timis, ke li pro tiu diablajo, kiel li nomis nian plej novan teknikon, povus perdi sian veluran basvoĉon. Josef Berliner, kiu kune kun sia frato Emil jam antaŭ la jarcento-

ŝanĝo estis fondinta *Germanan Gramofonkompanion* en Hanovro kaj poste translokiĝis ĝin al Berlino kaj havis ioman riskon kun nur 20 mil markoj da fonda kapitalo, diris iun belan matenon al mi: "Paku viajn valizojn, Rappaport, vi devos forvojaĝi al Moskvo kaj iel — ne demandu min kiel — persvadi tiun Ŝaljapin".

Sen mensogo! Mi envagoniĝis en la plej proksiman trajnon sen troa pakado kaj kunportis niajn unuajn ŝelakdiskojn, tiujn kun Melba, kvazaŭ gastodonaĉon. Kia vojaĝo! Ĉu vi konas la restoracion *Jar*? Elstara! Estis finfine longa nokto en tiu aparta ĉambro. Unue ni trinkis vodkon el akvoglasoj, ĝis kiam Fjodor krucoŝignis sin kaj ekkantis. Ne, ne tiun brilan kanton el *Boris Godunov*, sed ĉiam tiujn piaĵojn, kiujn ĉantas la monaĥoj per siaj abismoprofundaj basoj. Tiam ni ŝanĝis vodkon al ĉampano. Sed nur je aŭroriĝo li subskribis la kontrakton, plorante kaj daŭre farante krucoŝignojn. Ĉar mi

lametas ekde la infanaĝo, li verŝajne en mi, kiam mi persvadis lin subskribi, vidis la diablon. Kaj li subskribis nur, ĉar tenoro Sobinov jam estis en nia komerco, kaj tial mi povis prezenti al li tiun kontrakton, kvazaŭ kiel modelon. Ĉiukaze, Ŝaljapin estis nia unua vera diskostelulo.

Tiam ĉiuj venis: Leo Slezak, Alessandro Moreschi, kiun ni registris kiel la lastan kastriton. Kaj tiam mi sukcesis en la hotelo *di Milano* (nekredeble, mi scias, ĉar je unu etaĝo super la mortoĉambro de Verdi) ordigi la unuajn registradojn kun Enrico Caruso, dek ariojn! Kompreneble kun ekskluziva kontrakto. Baldaŭ ankaŭ Adelina Patti kaj tiel plu kantis por ni. Ni liveris diskojn al ĉiuj regnoj. La angla kaj la hispana reĝaj familioj estis inter niaj regulaj klientoj. Kaj kio koncernas la domon Rothschild, tiam Rappaport per kelkaj trukoj eĉ sukcesis forpeli la usonan liveriston. Tamen mi, kiel komercisto de diskoj, komprenis, ke ne utilis resti je ekskluziva nivelo, ĉar nur kun la amaso oni faras komercon, kaj pro tio necesis malcentriĝi por per pliaj stampfabrikoj en Barcelono, Vieno kaj — sen mensogo! — en Kalkuto esti daŭre konkurenckapabla sur la monda merkato. Tial la brulo en Hanovro ne estis kompleta katastrofo. Sed tamen tio ĉagrenis nin, ĉar ni komencis tre modeste ĉe la Cellea Ŝoseo kun la frajoj Berliner. Certe, ili estis geniuloj, kaj mi nur komercisto de diskoj, sed Rappaport ĉiam sciis: Per la disko kaj la gramofono la mondo reinventas sin. Tamen Ŝaljapin ĉiam faris senlime la sennombrajn krucoŝignojn antaŭ ĉiu registro.

Tradukis el la germana
Wolfgang Kirschstein

Sakraj-konkurso!

Oni tre malofte sakras en esperanto, multe malpli ofte ol en naciaj lingvoj. Ĉu ĉar esperantistoj ne estas sakremaj aŭ pro limigita vortprovizo? Ĉiukaze, ni ŝatus kreskigi la fivortprovizon de esperanto kaj tial invitas sendi al ni kiel eble plej trafajn, vulgaraĵojn, ofendajn kaj originalajn fivortojn. Uzu vian fantazion aŭ traduku de alia lingvo. Nur unu kondiĉo: La vortoj ne ataku unuopulojn.

La juĝkomisiono konsistas el Jardar Eggesbø Abrahamsen (prezidanto de NEL kaj doktoro pri lingvistiko), Otto Prytz (akademiano kaj devene el la norda, plej sakrema parto de Norvegio) kaj Heming Welde Thorbjørnsen (prezidanto de TEJO).

La unua premio estos kvin K-diskoj de *Vinilkosmo*. La dua kaj tria premioj konsistas el du kaj unu K-diskoj respektive. Sendu viajn kontribuojn plej malfrue 1 apr 2007 al <nje@esperanto.no> aŭ al NJE, Olaf Schous vei 18, NO-0572 OSLO, Norvegio.

Ni suspektas ke oni sakras tre malsimile en malsamaj lokoj, do ni esperas ricevi fivortojn de multaj partoj de la mondo!

Norvega Junularo Esperantista

La gusto de la Ŝekspira genio

William Shakespeare. *La Vintra Fabelo* / Trad. el la angla, enkonduko de Humphrey Tonkin. — Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2006. — 154 paĝoj.

Jam multaj dramoj de Ŝekspiro aperis en esperantolingva traduko. Zamenhof mem la unua kontribuis al tio, per sia traduko de *Hamleto*. Iuj postaj tradukoj de Ŝekspiro brilis, aliaj malpli imponas. Sed ĉi tiu traduko estas vere inda reprezento de sia originalo, kaj kelkarilate pli bona ol la originalo, ĉar la nun tre arkaika vortuzado en la Ŝekspira originalo anstataŭiĝas per modernaj vortoj Esperantaj, kiujn eĉ anglalingvano pli facile komprenas!

La vintra fabelo estas, kiel plejofte ĉe Ŝekspiro, bazita sur jam konata rakonto. La granda talento de Ŝekspiro, kiel de la antikvaj grekaj ĉefdramistoj, konsistis el majstra dramigo de jam konata rakonto, kombine kun memreĝisorata enteatrigo de la dramo, kun aktoroj kiuj ne nur repertuaris en lia kompanio, sed ankaŭ kun kiuj li povis konsulti por plej efike aperigi antaŭ la spektantaro la dramon. Pro tiu unika oportuno, neniu el la dramoj de Ŝekspiro havas vere *definitivan* tekston, ĉar li aliigis tekstojn laŭ la kapabloj de la aktualaj aktoroj, kaj reviziis detalojn de la agado konforme al la bezonoj estigataj de la teatra scenejo, la postuloj de la spektantoj, k.c. Tio parte klarigas iom da kongrueco en individuaj dramtekstoj, sed samtempe substrekas la vivimpreson kiun ili donas.

Ŝekspiro lokigis sian dramon en iu nespecifa antikva epoko. Tio ebligis al li ignori geografiajn kaj kulturajn problemojn, kiuj ekzistis se li volus prezenti la dramon kiel ian okazaĵon de lia propra periodo. Ekzemple, li povis atribui al la Reĝo de Sicilio honoradon de la Orakolo de Apolono en Delfoj (la vortoj de tiu Orakolo estas la turnopunkto en la intrigo de la dramo), aŭ uzi la nomon de fama skulptisto parolante pri supozata statuo de la Reĝino de Sicilio.

Koncize: la Reĝoj de Sicilio kaj Bohemio estas jam de sia junaĝo intimaj amikoj. Sed dum la Reĝo de Bohemio vizitas la Reĝon de Sicilio, ĉi tiu eksuferas ian freneziĝon, kaj erare kredas ke lia edzino amoras kun la



Reĝo de Bohemio. Malgraŭ ĉiuj atestoj kontraŭaj, li pli kaj pli firme kredas sian fantaziaĵon, ĝis li decidis murdi kaj sian edzinon kaj la vizitantan Reĝon. Amikaj korteganoj trovas necese kaŝe averti la Reĝon de Bohemio, por ke li fuĝu. Sekvas kelkaj ne inversigeblaj agoj. Pro la stato de sia patro, la filo de la sicilia Reĝo pereas; la Reĝo enkarcerigas sian edzinon, kie ŝi naskas bebon, knabino kiun li forsendas por ke ŝi pereu lasita en sovaĝa pejzaĝo bohemia. La tuta lando sicilia suferas.

Post iom da tempo la Reĝo komencas dubeti pri sia kredo pri la malfidelleco de sia edzino. Sed lia menso resaniĝas nur kiam senditoj al la Orakolo en Delfoj reportas la kredendan veron, eldiritan de tiu Orakolo: ke la Reĝino estis kaj restas fidela al li, ke lia fantaziaĵo ja estis freneza.

Sen lia scio, la Reĝino estas sukcese kaŝata de amikoj; la forsendita bebino estas trovita kaj vartata de bohemia ŝafisto kaj lia familio. La ŝafisto trovis kun la bebo skribaĵon de la Reĝino de Sicilio, atestantan la veran devenon de la bebo, kune kun multaj oro kaj valoraj, kiujn li zorge konservas dum dek ses jaroj. Ili servos kiel pruvo pri la origino de la knabino.

La princo de Bohemio kaj la ŝafista knabino renkontiĝas kaj ekamas unu la alian. Sed kiel povus reĝa princo edziniĝi tiel malaltklasan ŝafistinojn? Ili forfuĝas al Sicilio, kie la idento de la knabino riveliĝas. La du Reĝoj reamikiĝas. La kaŝita Sicilia Reĝino estas

prezentata al ili per pretendo ke temas pri statuo pri ŝi. La statuo *reviviĝas*, ĉiuj feliĉas, finiĝas la dramo.

La intrigo de la dramo prezentiĝas ĉefe en dialoga formo. La scenoj estas nelongaj, sed tre viglaj. La reĝisoro lerto de Ŝekspiro havis oportunon sin pruvi sur la scenejo, kaj sendube la spektintoj foriris de la teatro sentante la “katarsison” majstre efektivigitan de tiu genia dramisto.

Ĉi tiu tragikomedio enhavas malpli de la komikaj scenoj kiujn Ŝekspiro kutimis uzi por malstreĉi la emociojn. Nur unu rolanto, Aŭtoliko, kiu aperas en scenoj de la kvara kaj kvina aktoj, vere ridigas la spektantaron de la dramo, kaj lia karaktero estas multe pli profunde esplorata dum tiuj scenoj ol ni antaŭsupozus. Lia ĉarlatana ludemo ne nur amuzas, sed ankaŭ grave progresigas la intrigon en la dua duono de la dramo.

Distra estas *La Vintra Fabelo*, kelkfoje pensiga, sed ĉefe ĝi tiras la atenton kaj emocijn de la spektanto. La granda sukceso de la traduko farita de Humphrey Tonkin ŝuldiĝas al lia kapablo kuntreni la leganton per la natura karaktero de lia redono de la parolado. Oni ne sentas ke oni legas tradukaĵon.

Per tio li transdonas al ni la guston de la Ŝekspira genio; pli grandan laŭdon de traduko mi ne scias fari.

Donald Broadribb

Bonvolu korekti

En la rezulto de la literatura konkurso *Liro-2006*, publikigita en la januara kajero de *La Ondo de Esperanto*, bedaŭrinde enŝteliĝis eraro.

Dimitrije Janičić laŭreatiĝis en la branĉo *Originala poezio* ne pro *Mateo*, sed pro *Ripetita renkontiĝo*.

Mi petas pardonon pro spuroj de nia redakcia koboldo.

Bonvolu korekti la tekston en via ekzemplero.

Halina Gorecka



Ekskurse tra Rusujo

Puŝkin, Aleksandr. *Eŭgeno Onegin*: Versromano / Trad. el la rusa Valentin Melnikov; Enkond., koment. Aleksander Korĵenkov. — Kalinigrado: Sezonoj, 2005. — 256 paĝoj. — (Serio *Oriento-Okcidento*; №40).

Eŭgeno Onegin, versa romano verkita de Aleksandr Puŝkin en 1823–31, estas, laŭ vortoj de la tradukinto Valentin Melnikov, “probable la plej elstara verko de la tuta rusa literaturo”. Ĝia formala strukturo estas versa, kaj konsistas plejparte el 14-liniaj strofoj, kreitaj de Puŝkino speciale por ĉi romano, kun fiksjaj rimo kaj verso-longo. Temas pri mejlo-ŝtona verko, kiu, se mi ne miskomprenas, ne nur signifis definitivitan dignigon de la rusa kiel beletra lingvo, sed decide influis la postajn tendencojn en la rusa literaturo, aparte la socian realismon, tra la dek-naŭa jar-cento ĝis la revolucio de 1917.

En ĝi la aŭtoro priskribas fatalan amon inter splena dando nobela, Eŭgeno Onegin, kaj Tatjana, fraŭlino el kampara bieno. La rakontaj pecoj, fakte nur parto de la romano, alternas kun lirikaj ekskursoj, moraj kaj pejzaĝaj priskriboj, sociaj komentoj, amaj meditoj, diskutoj pri la poezia naturo aŭ elvokoj de gloraj historiaj eventoj en la rusa historio. Ĉi aŭtoraj interludoj estas intime plektitaj en la rakonta fadeno, kaj spegulas la verajn aŭtorajn motivojn; la recenzanto, do, por laŭe konformi al la verko, permesu al si digresion el sia propra pensujo...

Laŭ ies malica difino, klasikaĵo estas verko, kiun ĉiuj *opportune et importune* laŭdas, sed efektive malmultaj legas. Ĉiu lingvo havas siajn klasikajn, ver-ŝajnne senmortajn, kiuj sidas en multaj hejmoj sur bretoj harmonie kun apudaj ornamaĵoj, estas instruataj en mez-lernejoj, iu-foje eĉ kun apreco de sentemaj gimnazianoj, kaj eldonataj en luksaj bindoj, bon-ŝance kun riĉaj komentarioj.

Mi mem regule turnas mian atenton al *Donkiĥoto*, klasikaĵo en la hispana lingvo, mia denaska, kiun mi ellegis kiel mez-lernejano: de tempo al tempo mi revenas al ĝi kaj relegas ĉapitron, aŭ nur paĝojn; kelk-foje, laŭprefere, mi gustumas ĝin en la eleganta esperanta vesto de Fernando de Diego: la ekscitaj aventuroj, la vivaj dialogoj, la maliceto de Cervanto, en bela esperanto aŭ hispana, ĉiam ravas kaj katenas min.

Same mi faras ĉe disfojaj farnientoj pri *Gero*, la antonomazia klasikaĵo de la eŭska, mia nacia lingvo. Ĉi lasta tamen ege malsimilas laŭ naturo: temas



pri asketa, ŝim-odora man-libro por ali-tempaj katolikaj bigotoj, eldonita unua-foje en 1643. En ĝi, kiel en miloj da ali-lingvaj skolastikaj verkoj sam-epokaj, oni instruas piulojn pri la vojo al morala perfektigo kaj beateco. Mi konservas kaj relegas la saman volumon, kiun mi dense prinotis antaŭ dudek jaroj; tiam, kun fera volo de adoleskanto, mi decidis, eble ne tute malprave, ke veran posedon de la eŭska mi povos akiri nur trinkante el originaj fontoj, kiel *Gero*. Ties enhavon, kompreneble, mi trovas mucide kaduka kaj ridinda, sed mi ŝatas ĝin malgraŭe; min allogas ĝia pura kaj eleganta prozo, kiu ankoraŭ nun, post 364 jaroj, impresas nature flua kaj iel malarkaike imitinda. Ĉu ankaŭ vi, leganto de LODE, ĉerpus saman edifon el eventuala esperanta versio de mia plej ŝatata eŭsk-lingva legaĵo? Dubinde.

La demando pri la valoro, des pli universala kaj sentempa, de la t.n. klasikaĵoj montriĝas embarasa. Intence mi prezentis du ekstreme malsamajn tipojn: unu-flanke *Donkiĥoton*, ankoraŭ amuzan, atento-kaptan majstro-verkon forme kaj enhave apreceblan, mi pensas, de internacia legantaro; kaj aliflanke *Gero*, majstro-verkon, ĉi-kaze pro meritoj pure lingvaj, de certa kulturo sed apenaŭ interesan por fremduloj.

Melnikov faris virtuozan laboregon donante *Eŭgenon* al esperanto. Li riveligis unua-ranga stilisto meritanta lokon inter niaj grandaj tradukistoj, surpodie kun de Diego, Hauptenthal aŭ Pokrovskij. Mi apenaŭ trovis formajn malglataĵojn, kaj la ŝajnaj stumblo-blokoj, disegaj tra la teksto, ŝuldiĝas kredeble al Puŝkino mem, ne al la tradukinto: ja ĉi lasta atentigas la leganton en enkonduko, ke se iu trovos “adasismon aŭ tro banalan rimon, iom

strangan komparon, ŝanĝon de gramatika tempo ktp. — [li] sciu, ke tiuloke Puŝkino uzis la samon”. Nu, eble iu opinios la tradukintan memfidon sam-nivela al lia virtuo, sed ĉiu-okaze memestimo, se merita, ne estas malmerita.

Sed eble la tubero, krom en la nekapablo de la subskribinto, situas sur iom aliaj koordinatoj. Kulturaj varoj kaj formoj, kiel ajn valoraj oni taksas ilin en difinita periodo, ĝenerale respondas al laŭtempaj gustoj. Modoj kaj kordoj ŝanĝiĝas. Versa romano korsetita en la strikta trud-kitelo de metriko definitive ne kaŭzas saman impreson nun kiel antaŭ du jar-centoj. Se aldoniĝas abundo da aludoj metaliteraturaj — ne malofte al koteriaj plum-kunuloj — kaj celantaj la engaĝon de simil-kordaj sam-tempuloj — nu, mi dirus, ke la tuto prezentas ioman defion al hodiaŭa neinicita leganto, des pli se nerusa.

Atute ĉe *Eŭgeno* ni kalkulas je artisma esperantigo, klara en ĝeneralaj linioj, kiu tamen ne sukcesas ĵeti lumon sur kelkajn obskuraĵojn. Ĉe tiaj okazoj la senhelpa leganto povas nur vei simile al la protagonisto antaŭ arda versotorento de juna kaj amika poeto (pĝ. 41):

*Eŭgen' sen granda intereso,
ne tro sukcesa en kompren',
aŭskultis tamen lin kun pen'.*

Feliĉe skrupulaj komentarioj de Aleksander Korĵenkov, fine de la volumo, prilumas arkanon kaj klarigas pri historiaj fono, eventoj kaj aliaj kaŝitaj intencoj. Preterdire, se paroli pri arkanoj, Chris Long aperas kolofone kiel unu el la prov-legantoj.

Inter verd-lingvaj tradukistoj, ankoraŭ digresie, manifestiĝas certa inklino redoni el siaj propraj lingvoj verkojn ne rigarde al ties intereso por internacia legantaro, sed nur rezulte el ilia graveco en la propra naci-literatura historio. Influas ankaŭ la cirkonstanco, ke tiaj verkoj prezentas ne malofte stilajn komplikadojn, spite allogajn el tradukista vid-punkto. Kuŝas la impresoj, iu-foje prava, ke per tiaj esperantigoj cizeliĝas la prestiĝo kaj rimedoj de nia lingvo, kvazaŭ ekposedo de naci-literatura majstro-verko liverus senplie al esperanto ian plusan statuson.

Al ĉi kategorio mi senrezerve kalkulas Reinhard Hauptenthal, kiu senkompatate trudis al sia trupo da legantoj — ve, ne legio! — preskaŭ nur deknaŭ-jarcentajn romantikaĵojn, foje amuzajn. Oni ne miskomprenu min: ankaŭ tio bonas, kaj ĉiu-okaze esperanta tradukisto, laboranta nur pro amo al la metio, rajtas foruzi sian tempon kaj

talenton laŭplaĉe. Bedaŭrinde, tamen, ke interesaj kaj aktualaj aŭtoroj (ekzemple, inter la german-lingvaj, Peter Handke kaj Günter Grass) restas netradukitaj, aŭ eĉ pli mizere, mistradukitaj de s-ro Ajna Fuŝulo.

Probable maljustas kelkaj el miaj supraj konsideroj, ankaŭ aplikitaj al la ĉi-recenza objekto. *Eŭgeno Onegin* estas ja delikata sia-speca romano kaj, preter la anekdota intrigo, precipe pasia portreto de Rusujo, de ties landanoj kaj de ĝia animo plej profunda. La roluloj, malkiel en nur ŝajne simil-tonaj melodramoj, montriĝas neniel ŝablonaj aŭ stereotipaj, sed ili rivelas kompleksajn psikologiojn, kiuj evoluas kvazaŭ per interna viv-inspiro laŭ la fluo de la avataroj. La tono, jen severa, jen drola, jen ironia, impresas amuze maldramiga, kaj eĉ ludigas ridetojn ĉe la leganto. Enestas sendube ĝuindaj valoroj kaj klare rekoneblaj figuroj, kiel Tatjana aŭ Onegin, kiuj transcendis la striktan beletran kadron kaj enhejmiĝis en la psiko kolektiva kiel universalaj arketipoj, danke ankaŭ al rozario da ali-ĝenraj kulturaj sekvoj: operoj, filmoj ktp.

La traduko de Melnikov, kio koncernas pure lingvajn mekanismojn, ŝajnis al mi ne nur senriproĉe metiisma, sed rekte virtuozaj. Do ankaŭ ĉi-rilate la laboro estas sukcese plenumita. Kaj tamen... Bedaŭrinde mi ne certas, ĉu ĉi klasikaĵo, forme eksmoda kaj fone fora, sidos sur la bretoj de multaj vivo-ĉambroj.

Joxemari Sarasua



Ilustraĵo de Nikolaj Kuzjmin

“Alia Venecio”

Matvejević, Predrag. *Alia Venecio* / Tradukis [el la kroata] Tomasz Chmielik. — Czeladź: Hejme; Świdnik: Libro-Mondo, 2006. — 144 paĝoj, il.

Kiam ni pensas pri Venecio, nia imago tuj bildigas en nia menso la Bazilikon de Sankta Marko kaj ties placon. Aŭ eble nia imago revas pri la famaj pontoj aŭ pri la same fama kin-konkurso kaj ties “oraj leonoj”.

Tio ne okazas ĉe tiu ĉi moderna oratoro de Mediteraneo, kies ĉefurbo Venecio iasence estis, kaj tiu ĉi oratoro nomiĝas Predrag Matvejević. Li naskiĝis en Mostar en 1932, filo de kroato kaj rusino, dum jaroj li prelegis en la Zagreba universitato pri franca literaturo, poste migris al Francio kaj tie instruis en Sorbono komparan literaturon; nuntempe li instruas slavan literaturon ĉe la universitato *La Sapienza* en Romo.

Pri Venecio jam fluis riveroj da inko, jen en gvidlibroj jen en romanoj jen en pentraĵoj; la aŭtoro tion bone konscias kaj kapablas iri preter tio. Liaj vortoj vere malofte priskribas aspektojn de la urbo kiujn ĉiu ajn el ni povas scii danke al la multaj inform-fontoj kiujn ni disponas en tiu ĉi moderna epoko. Kvazaŭ romantika aventuristo, Matvejević vojaĝas tra tiuj lokoj kies ekziston apenaŭ iu konscias — verŝajne, eĉ veneciano mem ilin ne konas aŭ aŭdis pri ili nur ie, fabele. La kerno de tiu ĉi verko estas la detaloj pri kiuj ne zorgas distriĝemaj homoj: la rusto aŭ la bruo kaŭzita de pasantaj homoj estigas en li la memoron pri impresoj kaj sensaĵoj:

Rusto eniras metalon, tie pli malprofunde, kaj ie pli profunde. Diversajn ĝi havas kolorojn: nigran, brunan, ruĝan. Kelkloke ĝi estas rufa (ĝiajn kolorojn kaj nuancojn oni vidas sur la malfruaj bildoj de Ticiano). Tavoloj da rusto kaj patino kolorigas metalajn pordegojn, tabulojn, kradojn, barilojn, ansojn, ŝlosilojn. Ĝuste oni ne scias, kial unu objekton kovras patino, kaj la alian penetras rusto ekstere kaj interne, supre kaj malsupre. [...] Oni sentas ludojn, kiuj finiĝas kaj denove komenciĝas, allogadon kaj forpuŝadon, restaĵon de iu nekonata skribo, kiun vane ni klopodas deĉifri. [...] La rusto estas en Venecio eksterordinara, kaj la patino — kiel orplako.

Ĝuste tia estas la Venecio de Matvejević: el skribado kiu tamen estas samtempe realaĵoj (kiel rusto) sed ankaŭ impresoj. Se la leganto sukcesos

kredi plenfide al la aŭtoro kaj ties vortoj, li ricevos eble strangajn impresojn — impresoj el humido, akvo, putro, tempo, beleco, pasinteco, melankolio, miraĝo, marmoro, sablo, ŝlimo, oro, forvaporigintaj aŭ splendaj bildoj. Post la unuaj ĉapitroj, la leganto mem, danke al la anonimaj bildoj kiuj taŭge ornamas la libron, iĝas la romantika aventuristo kiu komencas ami fremdan lokon kaj iom post iom (ek)sentas sin hejme. La leganto ekflaras la odorojn ne ĉiam bonajn, aŭskultas kaŝe parolaĵojn de preterirantoj aŭ de kunmanĝantoj ĉe gastejoj, sidas apud maljunulo kiu reeĥas rakontojn, kaj promenante enamiĝas al skulptaĵoj kiujn li neniam vidis kaj verŝajne neniam vidos. Li aprezas la nuancojn de la patinoj, la orplakojn ĉe la ligno, ŝtono kaj briko; li esploras la antikvajn mapojn anonimajn. Kvazaŭ Matvejević pecon post peco kunigas resuman bildon riĉigitan de komenca malunueco.

Aparte legindaj multfoje estas laŭ mia modesta opinio la paĝoj 88 ĝis 94, kie nia romantika aventuristo min ravis pri *osterie, trattorie, locande, taverne, bettole kaj baccari* kaj ties legendoj, rakontoj, ĉefroluloj. Ĉefe en tiuj ĉi paĝoj montriĝas plene tio kion diras Renato Corsetti en la antaŭparolo:

En la tiam Venecio la multkultureco de la socio estis atingita pro neceso, kaj eventuale oni havis aliajn formojn de diskriminacio bazitajn sur la riĉeco, sed ne sur la kulturo. Bonvolu atenti, ke ĉi tiu multkultura sinteno daŭris ankaŭ dum la lastaj jarcentoj de la granda venecia potenco, kiam ĝi estas daŭre batalanta kontraŭ la ĉiam pli progresanta turka imperio, por “savi Eŭropon”, kiel oni tiam diris. La historio de Venecio povas montri al ni, kaj ĉiuokaze ĝi montras al mi, ke multkulturaj socioj estas eblaj, ke Oriento kaj Okcidento povas kunvivi kaj kunlabori [...]

Kaj ĉe la fino, ni retroĝuas la poezion de la tuta verko, kiu komprenigas al ni, ke ni ne vere legis eseon, longan priskribon, nekutiman gvidlibron aŭ personan taglibron, sed pli ĝuste superis la limojn de ĝenroj kaj eniris Fantazon.

Per mirinda kaj ĝuiga stilo, Tomasz Chmielik tradukis la verkon al Esperanto. Hejme kaj Libro-Mondo planas aperigi ankaŭ aliajn verkojn de Predrag Matvejević, ekzemple, *Mediterranean brevieron* kiu samkiel *Alia Venecio* akiris prestiĝodonajn premiojn internacivele.

Nicola Ruggiero

Esperanto en muziko: ne nur Esperantuje

Estas mirige, ke en Usono (sed ne nur en Usono) artistoj kaj bandoj elektas la nomon "Esperanto" kiel titolon de siaj albumoj, aŭ kiel nomon de la bando mem, kvankam ili ne Esperantas, ĉu temas pri modo?

Sed kial ili ne iam Esperantos?..

Ĝuste *The Esperantos* estas nova roka triopo el Bay City en Miĉigano (Usono).

Vere fajrigo, vigla kaj trafa garaĝroka stilo ludata de la moviĝemaj kaj energiaj Phil Roth (gitaro), Aaron Cianek (basgitaro) kaj Loe Jacobs (drumo), kiuj en nur unu jaro famiĝis en Miĉigano, kaj nun pretas konkeri la mondon... Tial *Esperantos* eldonis sian albumon, produktitan de la Bostona produktisto Richard Marr por la eldonejo *Red Car Records*.

La bando memorigas al ni la fierajn kaj ardajn nervojn de la mita bando *Stooges*, en siaj tekstoj la mastrumitan intelekton de *Kinks* kaj la rifojn (*Riffs*) ensorĉajn de muzikista generacio kiu estis forte influita de punko. La Bona Roko elfleksita de bluso kaj kiu ne timas malpuriĝi revenas kun *Esperantos*...

Atendante vidi ilin sur scenejo vi jam povas antaŭgustumi ĉe <http://www.theesperantos.com/>

Alia usona bando prenis la nomon *Esperanto* (Vd. la suban foton).



Ĝi konsistas el du famaj anoj de la metal/hardkora scenejo: Steve Micciche (gitaro) de *Every Time I Die* kaj Jesse Muscato (drumo) de *Kid Gorgeous* kaj de du membroj de la disiĝinta punkbando *The Budgets*, Steve Riter (basgitaro) kaj Ryan Caprio (kantado).

Oni povus atendi, ke la metala kulturo de la du famuloj havus influojn en



Ĉu la miĉigana triopo *The Esperantos* iam vere Esperantos?

la muziko, sed la unua produktaĵo de *Esperanto*, surbendigita en Novjorko ĉe la studio *Watchmen* (ses-titola albumo titolita *Play This Anywhere*, aperinta ĉe la eldonejo *Uprising*) mirige naskis stilon pop-punkan simplan sed energian.

Kun tiaj muzikistoj, la kvalito de la ludado en tiu disko ne estas seniluziiga kaj certe meritas atentan aŭskultadon:

Provu tion ĉe: http://www.uprisingrecords.com/new_site/html/frame_set.html

Se vi havas paciencon kaj tempon por traserĉi surfante en interreto vi povos trovi diversajn artistojn aŭ bandojn kies titolo aŭ albumo estas nomita *Esperanto*. Ekzemple, albumon *Esperanto* faris meksika popbando *Kabah*.

Vizitu la retpaĝojn de *Kabah*: <http://unmundoconkabah.cjb.net/>. Ankaŭ la fanklubo kaj diskeldonejo *Universal Music Latino* disponigas informojn kaj la diskon *Esperanto* en la angla: www.angelfire.com/music/fey/kabah. Tre kompletaj kaj interesaj informoj troviĝas en la hispana: <http://orbita.starmedia.com/~kabahxnel/>, <http://mx.geocities.com/kabahtuynosotros/index.html>.

En ĉi tiuj retpaĝoj eblas sekvi la novaĵojn pri la bando, malkovri ĝiajn diskografion, tekstojn, multajn fotojn,

kaj ekscii pri ĝi ĝis disiĝo en oktobro 2005.

Krome, albumojn *Esperanto* faris, interalie:

— Rick Braun, ĵaza trumpetisto el Usono;

— *Lalo Schifrin*, usona ĵazisto;

— *Shadofax*, ĵazfuzio/novepoko el Usono;

— *Elektric Music*, elektronika bando starigita de Bartos el *Eks-Kraftwerk* el Germanio;

— *Freundeskreis*, hiphopa bando el Germanio;

— *Viper*, poprokbando el Japanio (aŭskultu ĉe <http://viperviper.com/multimedia.htm>);

— *Ryuicky Sakamoto*, elektronika poproka bando el Italio/Japanio;

— *Rosario di bella, Paolino Dallaporta*, ĵazo.

(Pri kelkaj el tiuj artistoj kaj albumoj jam aperis artikoloj kaj prezentoj en *Rok-gazet*).


Ŝajne Esperanto estas inspira, kaj pro diversaj kialoj konscie aŭ nekonscie, vole aŭ nevole oni uzas aŭ misuzas la vorton "Esperanto". Sed ĉu tiu nomo ne estas universala posedaĵo? Ankaŭ Muziko ja estas universala, por ne diri universala... Ĉu muziko kaj Esperanto ne estas la plej trafetaŭgaj por tia universaleco?..

Plukis por vi

Flo!



Meksika grupo *Kabah*



Bona rezulto de la malfacila jaro 2006

Verŝajne, 2006 estis la plej malfacila jaro por *La Ondo de Esperanto*. Pro la duobliĝo (jam pli ol duobliĝo!) de la poŝta tarifo en Ruslando ni devis ŝanĝi la ekspedo-landon, kaj Pollando iĝis ankaŭ la pres-lando de *La Ondo*. Mankis pasint-jare reklamvojaĝoj kaj ni ne partoprenis UKon — ĉi tial malpli da novaj abonantoj estis kolektitaj. Sanproblemoj fine de la jaro... Sed malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj la abonantaro de *La Ondo* en 2006 denove superis tiun de la antaŭa jaro, kvankam la kresketo estas nur simbola — tri abonantoj pli. Dankon al niaj perantoj kaj al la abonantoj.

	1998	1999	2000	2001	2002	2003	2004	2005	2006
Ruslando	147	133	122	115	101	98	104	92	93
Aliaj landoj	136	170	238	257	305	407	421	450	452
Entute	283	303	360	372	406	505	525	542	545

En plej multaj landoj la nombro da abonantoj preskaŭ ne ŝanĝiĝis. La plej granda kresko estas en Usono (+6), kaj la plej granda perdo en Finnlando (-7). Novaj landoj estas Benino, Zimbabvo, Ĉinio kaj Kubo — ĉiuj danke al donacitaj abonantoj. Entute, niaj abonantoj loĝas en 43 landoj.

Jen la listo de la landoj kun pli ol 10 abonantoj (enkrampe estas la nombroj por 2005):

Ruslando	93 (92)	Belgio	19 (15)
Pollando	66 (65)	Svedio	19 (20)
Germanio	44 (43)	Hispanio	17 (20)
Francio	32 (35)	Japanio	16 (14)
Usono	28 (22)	Brazilo	15 (13)
Britio	27 (25)	Danlando	13 (15)
Italio	25 (24)	Svislando	11 (11)
Finnlando	22 (29)		

Estas malfacile prognozi, ĉu ni sukcesos reteni la nunan nombron ĉi-jare. Oni dire, la nove dezajnitaj kovrilo estas pli alloga, sed la baza kotizo senteble plialtiĝis, kaj ankaŭ dum 2007 ni verŝajne ne havos eblon informadi pri *La Ondo* en esperantistaj renkontiĝoj (escepte de ARKONES). Je la jarkomenco la abonantaro estis simila al tiu de la kelkaj antaŭaj jaroj.

AIKO

Ricevitaj libroj

Matvejević, Predrag. *Alia Venecio* / Trad. el la [kroata] Tomasz Chmielik; Antaŭpar. Renato Corsetti. — Czeladź: Hejme; Świndik: Libro-Mondo, 2006. — 144 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Monatoj tra la mondo / Komp., antaŭpar. Hori Yasuo. — Maebaŝi: Horizonto, 2005. — 96 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Shakespeare, William. *La vintra fabelo* / Trad. el la angla, antaŭpar. Humphrey Tonkin. — Rotterdam: UEA, 2006. — 154 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

[Zamenhof, L.-L.]. *Destino de Ludovika dinastio. 1907–1917* / [Komp. Itó Kanzi]. — Kioto: Ludovikito, 1991. — 1014 pĝ.; jaketo. — (Iom reviziita plena verkaro de L.L. Zamenhof. Originalaro 3). — [Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen].

[Zamenhof, L.-L.]. *Ĝis la homaranismo. 1896–1906* / [Komp. Itó Kanzi]. — Kioto: Ludovikito, 1990. — 1064 pĝ.; jaketo. — (Iom reviziita plena verkaro de L.L. Zamenhof. Originalaro 2). — [Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen].

[Zamenhof, L.-L.]. *Unua etapo de Esperanto. 1878–1895* / [Komp. Itó Kanzi]. — Kioto: Ludovikito, 1989. — 972 pĝ.; jaketo. — (Iom reviziita plena verkaro de L.L. Zamenhof. Originalaro 1). — [Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen].

Ricevitaj gazetoj

EAB-Update. 2007/36; Esperanta Finnlando. 2006/6; Esperanto aktuell. 2006/6; Esperanto en Skotlando. 2006/194; Esperanto. 2007/1; Heroldo de Esperanto. 2006/16; Informa Bulteno. 2006/4; Informilo. 2006/12; Internaciisto. 2007/1; Kontakto. 2006/5-6; La Gazeto. 2006/127; La Ondo de Esperanto. 2007/1; La Revuo Orienta. 2006/11; La Sago. 2006/31; Literatura Foiro. 2006/224; Litova Stelo. 2006/6; Monato. 2007/1; REGo. 2006/6; Scienco kaj Kulturo. 2006/6, Speciala Eldono; Sennaciulo. 2006/12; Service de Presse. 2006/31; TEJO Tutmonde. 2006/4-5-6; Tempo. 2006/4.

Gazetoj

Literatura Foiro. 2006, №224

La unua literatura esperanto-gazeto *La Revuo* estas unu el la akcentoj en la decembra numero 224 de la revuo *Literatura Foiro*, per eseo de Giorgio Silfer.

Diversaj literaturaj premioj estas en la fokuso: la Nobela por la turka Orhan Pamuk (artikolo de Jordan Slavejkov), Goncourt kaj tiu de la Franca Akademio por la usona Jonathan Littell, Prix Femina por la kanaddevena Nancy Huston (artikolo de Ljubomir Trifonĉovski). La legantoj de *LF* elektos inter ses prozaj libroj la PEN-Premion *La Verko de la Jaro 2006*: en la numero estas la balotilo.

Originala literaturo: poemoj de Nicolino Rossi kaj Petro Palivoda, humura rakonto de Tim Westover. Traduka literaturo: Carlo Minnaja pri *La Gefianĉoj* de Alessandro Manzoni (trad. Battista Cadei), recenzoj de Julian Modest pri *Toldi* de János Arany (trad. Márton Fejes) kaj de Milena Georgieva pri *Mio, mia filo* de Astrid Lindgren (trad. Leif Nordenstorm).

“Paula Märthi estis ja Aldo de Giorgi” informas la revuo kaj prezentas la faktojn. Sigurdur Pétursson intervenas en la debato inter Dimitar Haĝiev kaj László Radacsy pri la altrudo de etnolingvaj signifoj al E-vortoj (ekinta en la aprila *LF* 220). Christian Declerck prezentas sian opinion kadre de la debato pri la morto de Jesuo (komencita per artikolo de Dimitar Haĝiev en *LF* 216). Haĝiev mem prezentas nun la fenomenon “bogomiloj” de la deka jarcento, kiu donas sian signifan influon en Eŭropo, de oriento al okcidento.

Muzika kulturo: Milena Makaveva prezentas la kompaktdiskon de Vera Jordan *Esperanta voĉo*. Teatra rubriko: 80-jara jubileo de Jerzy Fornal kaj kurtenoj por Teo Jurukov.

Roman Dobrzyński respondas al la recenzo de Zofia Banet Fornalowa en *LF* 220 pri la libro *La Zamenhof-strato* kaj por plipezigi sian pozicion alvokas la helpon de L. C. Zaleski-Zamenhof, kies letero same trovas lokon en la numero.

HeKo

Ne forgesu reaboni!

20 respondoj venis por la novembra tasko *Ok proverboj*. Ĉiuj estas tute ĝustaj. Ilin sendis: Edmund Grimley Evans, Malcolm Jones (Britio); Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen (Finnlando); Edson Correa Capucci (Brazilo); Jackie Huberdeau (Francio), Gunter Ebert, Hans-Burkhardt Dietterle (Germanio); Ester Olsen (Norvegio); Jadwiga Benicka, Mirosława Kubicka, Hanna Skalska, Zbigniew Tylkowski (Pollando); Viktor Alikin, Bronislav Ĉupin, Klara Ilutoviĉ, Svetlana Konjašova, Nina Zujeva (Ruslando); Roland Larsson (Svedio); Ludmila Orajevskaja (Ukrainio).

La ĝustaj respondoj: Laŭdu tagon nur vespere. Proverbo estas sperto, proverbo estas averto. Simio al simio plaĉas pli ol ĉio. Silento estas konsento. Konscienco senmakula estas kuseno plej mola. Ne ŝovu nazon en fremdan vazon. Pli bona pano sen butero ol dolĉa kuko sen libero. Komenco bona — laboro duona.

La loto donis premion al **Roland Larsson**, kiun ni kore gratulas!

Trovu la titolojn

VANDALA SERĜENTO JE Opono
NI DRINKU JE MISO N-RO...
ORANĜA BURDO, SONU ĜUE!
DO, ĈERKA TRISTO
AGRESA STURNO
ŜABLONA TURO
VI — ANGLA REĜLANDO!
ESPLANADO... PAŜO... JELPO!
ADIAŬ, NAŬA ELFO: MALLEĜA KUGLO...

Bonvolu trovi en la supraj anagramoj naŭ titolojn de Esperanto-libroj. Sendu la solvojn al la redakcio de *La Ondo* rete aŭ poŝte antaŭ la 15a de marto.

Kompilis **Tatjana Auderskaja**

Pri kio ridis niaj pioniroj?

Oni povas kredi ke esperantistoj estas tro seriozaj homoj, ĉar en la jaroj 1889–1891 en la unua Esperanto-gazeto, *La Esperantisto*, estis neniu ŝerco aŭ anekdoto. Sed en 1892 ekaperis en ĝi la rubriko *Bagateloj*. Post la iom longa *El unu prediko* en januaro, venis tuta kolekto en la februara, el kiu ni plukis kelkajn. Vidu: pri kio ridis Zamenhof, Schmidt, Grabowski kaj aliaj pioniroj.

Kredemeco.

A: Vi estas malsaĝulo, mia sinjoro!

B: Sinjoro! mi sendos al Vi miajn atestantojn!

A: Ne bezone, sinjoro, mi kredas tion ĉi ankaŭ sen atestantoj.

Senkulpiĝo.

Sinjinorino, forlasante sian servantinon: Jes, mi bedaŭras, sed mi ne povas repreni mian ateston en via serva libro pri via nepuremo. Rigardu do mem ekzemple la malpuraĵon de muŝoj tie ĉi en la angulo.

Servantino: Tio ĉi ja estas ne mia kulpo! tiu ĉi malpuraĵo jam estis, kiam mi antaŭ jaro komencis mian servadon ĉe Vi.

Tro granda postulo.

— For! al sanaj kaj fortaj mi almozon ne donas.

— Kiel vi volas; pro Viaj kelkaj centimoj mi al mi piedon ne rompos.

La Esperantisto, 1892, №2, pĝ. 25-26.

SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ el la kolekto de reduktoro

Pola Radio: Tenebraj tempoj

Lau anonco la elsendoj aperos je la 17-a horo lau mezepoka tempo kaj dauros 20 minutojn. (<http://groups.yahoo.com/group/EAF-agadas>, 9 jan 2007; Rimarkis Jorma Ahomäki)

Civita ekzistadismo

Mi multfoje ripetis ke nia ekzisto estas celo en si mem. Esperanto enskribiĝas en la historio de la homaro per sia ekzisto. Nenio pli. Ĝi ne bezonas konkeri la mondon per la fina venko. (Novjara saluto de Konsulo Walter Ŝelazny, HeKo 320 9-C, 12 jan 07)

Titano... provis ribele invadi Olimpon (PIV)

Antaŭ ĉio mi dankas al la nova Konsulo Giorgio Silber <...> pro la tuta, titaneska laboro. (Samloke)

O, fiperiodo!

... apartan atenton kaptas la novjara mesaĝo de Renato Corsetti <...> la lasta prezentata de la aktuale oficanta UEA-prezidanto, kies dua ofiperiodo plenumiĝos en Johohamo. (<http://www.polskieradio.pl/eo/dokument.aspx?iid=46808>, Temoj el la E-gazetaro, 9 jan 2007)

Celoj en marmoro?

En sia <...> artikolo la Ĝenerala Direktoro de UEA evidente detaligas ankaŭ la taskojn kaj laborojn de la CO, fine memorigante la laŭstatuajn celojn de UEA... (Samloke)

El la jar-raporto

Tamen, en la prtaktiko, estas foje malfacile distingi la agadon de la fakaj asocioj... (Estrara Raporto // *Esperanto*, 2006, №6, pĝ. 126)

Ekster la ludo

...en la statuto mankas artikolo pri ekludo de komitataj kiuj misuzas sian komitatanecon! (Ileana Schroeder, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/2758>, 7 jul 2006)

Ekzaltaj eksaltoj

La lastan 8an de decembro vespere, en Sanvitorio Latia, teleregita de Nicola Ruggiero <...>, prezidanto de Itala Esperantista Junularo, estis eksaltata la plej granda kristnaskarbo en la mondo. (*Informitale*, 7 jan 2007)

Inter Poldavio kaj Sildavio

Rumanio, Ukrainjo <...> Mordavio... Brugario (landonomoj sur mapoj en: *Monatoj tra la mondo*, pĝ. 10, 46; Rimarkis Ionel Oneț)

Plukis István Ertl

LA ESPERANTISTO.

Gazeto de la lingvo internacia Esperanto.

Administracia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Redakcia Adresaro: Guda, Berlino. | Redakcio: la lingvo internacia Esperanto.

Perantoj de "La Ondo de Esperanto"

Argentino: Roberto Sartor, Beruti 2792, 3° 9, C 1425, BBF, Buenos Aires

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, Caixa Postal 03625, Brasilia, DF 70084-970

Britio: David Kelso, 5 Craighenhill Road, Carluke, ML8 4QT

Bulgario: Grozdenka Filipova, str. Rajko Aleksiev 23, 4400 Pazardžik

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: Jozefo Baksa, Pf. 115, HU-8901 Zalaegerszeg
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: Prof. Lee Chong-Yeong, Yulim Norway Apt. 106-1305, 906-1 Bomodong, Taegu 706-930

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 4 Harlech Mews, Avonside, Christchurch, NZ-8004

Pollando: PEA, skr. poczt. 21, PL-44-101 Gliwice

Portugaliao: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Jančić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby


Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530

TRA ESPERANTUJO



Tra la tuta Esperantujo niaj "pacaj batalantoj" vaste festis kaj festenis je la Zamenhofa Tago. Foje la solenado estis serioza, kun raportoj kaj prelegoj, ekzemple, en Dandong (Ĉinio), kie Wu Guojiang prezidis te-kunsidon de Liaoning-provinca Esperanto-Asocio, vd. pĝ. 4. (Fotis Mu Xiangrong)



Sed pri la Zamenhofa Tago en Irano ni ricevis ne artikolon, sed nur referencon de Reza Torabi al ret-kolekto de Irea-2006. Nu, el tiu fotokolekto ni scias certe, ke niaj iranaj samideanoj ne malsatis dum la festado.



Preteksto por festo estas facile trovebla. Ekzemple, jarŝanĝo. Kaj je la jarŝanĝo en Trier oni povis ne nur sekvi prelegojn kaj bone manĝi, sed ankaŭ spekti pupteatraĵon, vd. pĝ. 6. (Fotis Dirk De Weerd)

Internacia Fotokonkurso: "Respegulo de la alia mondo" (foto de Jurij Kajum)

